HUNGARA VIVO

3
1972
8,— Ft

Balatonvilágos

Budaörs

KORE NI ATENDAS NIAJN KARAJN AĈETANTOJN ĈE NIAJ BENZINSTACIOJ





Fonyód

Szarvas

Balatonederics

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII, Kenyérmező utca 6.

ENHAVO

Zoltán Fábián: Historio de sepdekkvin sekundoj. Tr. *L. Kökény* . 2

K. Kalocsay: Janus Pannonius . . 5

J. Szekeres: Panoramo 6

L. Lesznai: Baroka muziko en Hungario 8

J. Mátéffy: Jubileas Budapeŝto . 10

T. Dóra-dr. O. Haszpra: La akvonodo de Kisköre 12

Attila Hlavaty: Pseŭda psalm' . . 12

Andor Buzás: Mia vivo. Tr. *P. Rados* 12

Intervjuoj kun prof. Albert Szent-Györgyi, kaj prof. Dénes Gábor. Tr. *M. Fejes,* L. Rieth. . . . 14

Jaan Ojalo: La Tragedio de l' homo en Estonio 16

gm. Csaba Rékassy 17

L. Tárkony: Revuo de Revuoj . . 18

V. Benczik: Ludoviko Kökény 75-jara 20

kk.: Zanzo 22

Intervjuo kun prof. Lajos Jánossy. Tr. *István László* 22

Recenzoj 23, 28, 29

V.Benczik: Pri la taskoj kaj rolo de la Esperanta literaturo . . . 24

Facilaj legaĵoj. Humuro, anekdotoj 25

Leterkesto 29

Korespondi deziras 29

FERI: Mesaĝo de PETŐFI. Kruc-vortenigmo 31

Sur la kovrilpaĝo: *Csaba Rékassy:* — Popolfabeloj

ADIAŬO ĜISREVIDA

En la antaŭa numero de nia revuo Hungara Esperanto-Asocio bonvenigis niajn gastojn aliĝintajn al la Hungara Kultur-festivalo. Nun, post tiu renkontiĝo, ni havas la honoron diri tiel same ĉi-loke adiaŭon kaj ĝisrevidon.

Kompetente prijuĝi la valoron kaj interesecon de la Festivalo estas la rajto de la gasto. La dom-mastro nur klopodadas diveni, ĉu la partoprenantoj akceptis kontente la preparitan programon. Ĝin oni intencis tiel kunmeti, ke la festivalanoj ricevu gustumaĵon el ĉiuj terenoj de la hungara arto, kulturo. Tamen, en la centro de la prezentadoj troviĝis la beletro. — Grandsukcesa estis tiu matineo, kie niaj verkistoj-eminentuloj, *Kalocsay, Szathmári* kaj *Tárkony* parolis pri la iama Literatura Mondo, kaj pri tiuj LM-kunlaborintoj, kiuj jam ne estas inter ni, ekzemple pri *Julio Baghy, Ferenc Szilágyi* kaj *EMBA*. La grandaj ovacioj montris, ke la publiko ĝojis vidi la vivantan trion el la „Budapeŝta Skolo". Sur la podio sonis la verkoj de la vivanta kaj forpasinta trioj, kaj Kalocsay povis esti aplaŭdata ankaŭ kiel poem-recitanto.

Belsukcesa ŝajnis ankaŭ la muzika programo: ĥoroverkoj de *Bartók, Kodály, Bárdos, Vass,* la rava pianludo de la pian-artisto Kossuth-premiita *Imre Ungár,* la orkestro-koncerto de la Budapeŝta Simfonia Orkestro de Hungaraj Ŝtatfervojoj sub gvido de *Miklós Lukács.* Sed la plej furoran sukceson rikoltis la ĥorestro *Lajos Vass* kun la Ĥoro de la Artensemblo „Vasas", precipe, kiam li entiris ankaŭ la publikon en komunan kantadon. La gastoj — ankaŭ eksterlandanoj — komence timide, poste brave kaj fine jam plezure kantis la belmelodian hungaran popolkanton tradukitan de Kalocsay:

Vidu, mia patrin', kara mia patrin', vi min naskis domaĝe.
Aŭ min en riveron, tuj min en riveron ĵeti estus pli saĝe.
Rivera flu' en Danubon frostan portus min.
Estus mi nenies, estus mi nenies neamata amantin'.

En la teatra programo niaj gastoj povis spekti du unuaktaĵojn: unu de *Frigyes Karinthy:* „La granda dramverkisto" kaj unu de lia filo *Ferenc Karinthy:* Bösendorfer". Eminentis la du renomaj profesiaj aktor-artistoj *Zoltán Gera* kaj *Lilla Mikes.* Konataj aktor-artistoj — inter ili *Ferenc Baracsi, Ildikó Laczó* — deklamis, kantis plaĉe.

Ekspozicio de esperantistaj belartistoj hungaraj, vizito al muzeoj, ekskursoj, urborigardo, folklor-vespero, pupteatra prezentado — jen estis la kroma regalado.

Ni memoru speciale pri la inaŭguro de la memortabulo, kiun oni lokis sur la muro de la iama doĝdomo de *Julio Baghy.* Ĝi estis kortuŝa solenaĵo.

Ni esperas, ke la karaj gastoj rememoros kun bonaj sentoj la Festivalon kaj Hungarion. Ni esperas ju pli baldaŭan plenumiĝon de la adiaŭaj vortoj: Ĝis revido donove en Hungario!

Hungara Esperanto-Asocio

Zoltán Fábián

Historio de sepdek kvin sekundoj

La fajro estis brulanta jam de unu kaj duono da tagoj, ĉirkaŭe de tridek du horoj. La domo ekbrulis frumatene, la antaŭan tagon, je la kvara kaj dek.

— Mi rigardis mian horloĝon — diris la maŝinisto. — Li malfermis sian tromalsekiĝintan, ŝliman pluvmantelon, el supra poŝo de sia vatita kurta mantelo li eltiris sian dikan Doxa-horloĝon, kaj rigardis ĝin. Ĝuste la nunan tempon ĝi montris, preskaŭ laŭminute, nur je frumateno.

La verkisto oftege balancis sian kapon kaj dume skribadis per hirtecaj literoj en sian notlibreton. Li sidis sur angulo de ilara kesto, kaj la notlibreton li tenis sur sia suprenlevita maldekstra magra genuo. Li demandis:

— Ĉu vi pensis je tiu ĉi eblo?

— Jes, ni kalkulis kun ĝi.

La bormastro interparolis:

— Okazis ĉiuj sekurecaj disponaĵoj. — Li havis fortan, sed nikotin-morditan voĉon.

— Jes, — kapbalancis la verkisto, kaj returniĝis al la maŝinisto: — Ĉu pro tio vi leviĝis tiel frue?

— Ne pro tio mi leviĝis.

La verkisto rigardis je li per stranga dubeto, de malantaŭ de siaj senkadraj okulvitroj li okulumis miopeme.

— Mi kutimas frue ellitiĝi — diris kurte la maŝinisto. Lia ventoblovita, bronzoruĝa vizaĝo restis sen moviĝo.

— La ceterajn ja diros al vi la ĉefo.

Dum irado li kuntiris la pluvmantelon, kaj la zonon li tiris strikta. Liaj ĝis-femursubaj gumbotoj estis tro lozaj sur la longaj, mincaj kruroj, la botoj glitadis, ŝmacadis en la jododora griza kotkaĉo.

Kune kun la gaso elfluegis ankaŭ varmega akvo el la puto, kuracakvo kun 82 gradoj, krome ŝlimo kaj gruzero. Ĝi ŝprucadis tondre, ĵetiĝis alten, tra la kructraba kradaĵo de borturo, kaj en la mezmezo ĝi brulis, flagradis ruĝe.

La verkisto etendadis sian kolon, volvitan per kadrita ŝalo kaj elrigardis tra la barakfenestro.

— „Faroso flamas fore iuloke" — li citis verson de Ady. Li estis ekscitita kaj emociplena, li interesiĝis kaj notadis tiel, kvazaŭ la puto estus ekbrulinta, por ke li priskribu tion.

— Ŝtoneto ĵetiĝis al la turo — klarigis la bormastro —, kaj tio kaŭzis la fajron. La ŝtono estigis fajreron, kaj la gaso eksplodis.

La verkisto skribis laŭvorte: —... eks-plodis. Punkto. — Li suprenrigardis. — Ĉi maŝinisto estas interesa homo.

— Ordama homo. Ni laboras kune de dekdu jaroj.

— Ĉu vi konas lin de tiu tempo?

— Ne. La milito kunvenigis nin, pli ĝuste la militkaptiteco. Foksani en Rumanio.

— Do ĉu la amikeco komenciĝis tie? — demandis la verkisto, kaj rapide notis: La bormastro estas kolosa blonda viro, li havas rondan, karnecan vizaĝon, portas brunan peltoĉapon.

— Ĉu amikeco? — li redemandis. Subite li enfermiĝis, kaj daŭrigis laŭ oficiala tono: — Ni atingis la gason post dumil sesdek metroj. Ni tuj haltis kaj sekurigis. Domaĝe, sed la klapoj ne elportis la premon. Vi ja scias la ceterajn.

— Kaj ĉu la maŝinoj? kio okazis pri la maŝinoj?

— Ni elsavis ĉion. Nur unu restis: la levaparato. Ĝi estas pezega, ducent dudek kvintaloj, la traktoroj ne kapablis fari ion. Ni petis de la soldatoj tri tankojn, ni provados per ili. Malbono estas nur, ke ĝi estas tuj apud la eksplodo, ene en la fajro.

La verkisto metis poŝen la plumon kaj la notlibron, li frotadis sian rigidiĝintan, magran mansupron, li havis kurtajn, mincajn fingrojn, la bluaj vejnoj travideblis sur la haŭto. En la barako estis malvarme, de unu kaj duono da tagoj neniu ekpensis pri la fajrofaro.

Ili eliris.

Jam forte krepuskis, sed la flamanta fajrokolono emanigis tagan lumon sur la tutan ĉirkaŭaĵon, kaj ĝia varmo preskaŭ bruligis ĝis la barako. Ĝin kovris vapornubo, ŝaŭmanta ŝlimolafo, de malproksime ĝi aspektis, kvazaŭ ĵus oni blovus ĉirkaŭ ĝin el fandiĝanta vitraĵo egan, konusforman cilindron. La friska aerblovo naĝigis ĝian densan, nigran fumon rivero-direkten.

Kiom da metroj ĝi povas esti? — demandis la verkisto, ĝustigante siajn senkadrajn okulvitrojn, ĉar blindigis lin la subita eklumo.

La bormastro atentis pri la koto per piedspuroj tre degeligita.

— Ĉiam alia, nun povas esti tridek. — Kaj ekpaŝis antaŭ la verkiston. Gardu vin, paŝu ĉiam en mian piedspuron — li diris dorsdirekte.

Alvenis la tankoj, pigre ili alkroĉiĝis sur la neĝokovrita montetodorso. Ilia sono ne aŭdeblis, tiome siblosusuris, rulbruiĝis la puto. La bormastro, petinte indulgon, lasis la verkiston sola, rapidis antaŭ la tankojn, permane li montradis al ili, kien iriveni, kie ili haltu. La flagranta ruĝa lumo vibrante speguligis sur la ĉerkoforma flanko de la proksimiĝantaj kanonturoj kaj sur la antaŭenemaj kanontuboj.

La verkisto certan tempon rigardadis heziteme, li evitadis senkonsile la haladzajn marĉetojn kiuj eligis el si pikan odoron. De la puto ne malproksime li rimarkis grandetan homgrupon. Li iris tien. Estis tie fajrobrigadistoj kaj muntistoj, en veltola pluvmantelo, kun kapentiritaj kapuĉoj. Ilia ombro estis kurta, ĝi saltadis tien kaj reen sur la koto, kelkfoje surŝprucis ilin varmega ŝlimoflano.

La maŝinisto direktis la laboron, ĉefe per moviĝoj, ĉar ĉi tie, en la surdiga bruo, oni povis interkompreniĝi nure per kriado. Oni deruligis de sur ĝia tamburo dikan, unu kaj duoncolan ferŝnuregon, ili rulis la tamburon en tiu direkto, kie la tan-

koj lokiĝis. La maŝinisto muntis grandan forĝferan kroĉilon sur finaĵon de la ŝnurego, per ties helpo li kroĉis la ŝnuregon sur sian brakon, kaj ekiris.

La bormastro alvenis kuranta.

— Kien vi iras? — li kriis al la maŝinisto.

Tiu montris per sia kapobalanceto, ke li iras tien al la puto.

— Ne vi iros! Mi ne lasas!

La maŝinisto rigardis strange je li, sed ne respondis. Li kliniĝis, prenis de sur la tero longetan ĉenon, kaj iris internen, en la grizruĝan, siblosusuran vaporon.

— Haltu! — La bormastro postkuris lin, kaptis la pluvmantelon, kaj turnis lin al si mem: — Kion vi do volas?

— Kion mi volas?! — Li skuis sian kapuĉan kapon. — Mi ligos la ŝnuregon sur la levaparaton, por ke ĝin eltiru la tankoj. Tion mi volas.

— Ne tion vi volas.

— Sed mi volas tion. — Li parolis tiel mallaŭte, ke la verkisto komprenis plie nur el la moviĝo de lia buŝo, kion li diras. — Lasu min, bonvolu.

— Mi ne lasas vin. Ne vi iros.

— Sed mi iros.

— Mi ne lasos — kriis la bormastro, kaj skuis la alian homon. Sur lia karneca, ronda vizaĝo, duflanke ĉe la buŝo la sulkoj kvazaŭ pastiĝis.

— Ne vi iros, vi ja ne rajtas iri, ĉiu alia povas iri, nur vi ne.

— Kiu do? — Tion li demandis jam kriegante.

— Mi.

— Tion vi ne rajtas, vi ne rajtas riski vian vivon.

— Kaj ĉu vi jes?

— Ĉu mi?! — Li ridis kurte. — Hm. Kial ne?! Vi scias plej bone. — Li paŝis reen, por eltiri sin el mano de la bormastro, sed tiu prenis lin forte kaj paŝis kun li. — Lasu min! — li kriis al la bormastro. — Lasu min al mia propra vojo!

La bormastro diris kviete, preskaŭ petegante:

— Ĉion mi lasas, sed tion ne, nur tion tute ne. Tion mi ne povas lasi.

— Tamen vi lasos — diris la maŝinisto. — Tion vi ne povas forpreni de mi, tiun *unu* ne. Vi ne rajtas ja tion. — Li deŝiris de sur si la manon de la bormastro. Poste li ridetis.

La verkisto tiam vidis lin rideti la unuan fojon. Li estis timiga, turpa viro, ridetante eĉ pli timiga, pli malbela; lia anguleca, bronzruĝa vizaĝo fandiĝis je pecoj, je diversaj partetoj, kiuj adaptiĝis sen ia senco unu al alia.

Ĉiu estis nervoza kaj maltrankvila. Ĉiu rigardis la du virojn, malantaŭ ili la rulbruege brulantan puton, la siblosusuran vaporon kaj la ŝaŭmantan, ŝprucegantan ŝlimolafon. La bormastro volis ankoraŭ diri ion, sed li nur senpove svingadis siajn manojn, lia larĝa suba lipo konvulsiis. La maŝinisto kuntiris la kapuĉon antaŭ la vizaĝo, kaj ekiris; li iris internen al la puto per longen etendiĝantaj, rapidaj paŝoj. Post la tria paŝo ili jam ne vidis lin, li malaperis de antaŭ iliaj okuloj, la dratŝnurego rampis post lin kvazaŭ serpento en la ŝmacanta koto.

— Jam dek sekundoj — diris la bormastro. Li ripetis: — Jam dek sekundoj. — Li turnis sin al la verkisto: — Mi petas vin, atentu la tempon, mi denove petas vin. Min ŝarĝas granda respondeco, kaj mi ne havas paciencon tion rigardi.

La verkisto kapbalancis: bone, estas en ordo. Li suprentiris la mantelon sur sia manartiko, kaj rondtiris trifoje la streĉilon de sia horloĝo.

— Post po ĉiuj dek minutoj anoncu, mi petas. Bonvolu anonci post po ĉiuj dek minutoj.

Pli fore de la puto, kien ne atingis la ekscito de la diskuto, kvar homoj trankvile rulis malsupren la tamburon per la dratŝnurego. Ili atingis la unuan tankon. Soldatoj ĉirkaŭis ilin, kaj helpis fiksi la ŝnuregon sur la tankon, al la trakci-hoko.

— Dudek sekundoj — diris la verkisto.

— Ne... oni ne eltenas tion pli ol minuton — vortgalopis la bormastro —, oni ne povas tie elteni. Estas varmege tie, oni eĉ aeron ne ricevas, estas gaso tie, kaj-kaj-kaj produktaĵo de la brulado, karbomonoksido. Estas tute neeble: tie neniu eĉ minuton povas elteni.

La dratŝnurego brutiriĝis unu pli longan, poste du mallongajn distancojn kaj tiam ĝi haltis, ne rampis plu.

— Tridek sekundoj. — La verkisto momenton rigardis direkte al la tankoj, la tamburo jam staris ĉe la dua tanko, sur tiun oni maŝligis la dratŝnuregon.

La bormastro kriadis histerie:

— Atentu la tempon, mi petas, akurate vi atentu! Mi devas scii ĉiam, kioma tempo estas, kiom jam pasis, mi devas scii tion. Oni ne povas elteni tie pli ol minuton, tio neeblas.

— Kvardek sekundoj.

— Ne eblas, li sufokiĝas, li kuiriĝos. Ne, do tio estas tio, tio, mi devas iri post lin. Akurate vi notu la tempon, mi petas, tre akurate. Mi devas scii tion, jes. — Li turnis sin al du muntistoj apude starantaj: — portu ĉi tien, portu rapide tendotolon, tiun mi surprenos kaj tiel mi iros post lin. Tuj kuru por tiu tendotolo.

— Kvindek sekundoj — diris la verkisto. — Li longe rigardadis la bormastron, kiu konstante moviĝis, tien kaj reen tretadis en la koto, kaj per sia ega, muskola brako haste gestadis.

— Rapidu! — kriis la bormastro post la du kurantaj laboristoj. — Rapidegu! Ni havas nur tempeton, nur iom da tempo. Ĝi estas en la deponejo n-ro 2, malantaŭe sur la breto. La maljuna Moĵi donos ĝin al vi, li scias, kie ĝi estas, sur la breto tute malantaŭe.

— Sesdek sekundoj.

— Sesdek sekundoj — li reeĥis raŭke. — Terure, frenezaĵo!

Mi ne devus lasi, ke li iru, mi ne devus lasi. Nun estas jam malfrue, mi lasis, mi ja lasis, kaj li eniris. — Fikse li rigardis en la fajron: — Rigardu nur, rigardu, ĉu ne li estas tiu, ĉu ne li estas? Ne, eĉ nun ne estas, ne estas. Frenezaĵo, terure, kio okazas. Kie estas jam tiu littuko, tiu tolo, kie ĝi jam estas?

— Sepdek sekundoj.

— Li eniris, li iris, li iris. Kaj mi lasis. Kie estas jam tiu tendo? Ni ne havas jam tempon, ne eĉ unu sekundon.

Ili ekvidis la maŝiniston. Kliniĝante antaŭen, per kuraj paŝoj li venis eksteren el la siblosusura flagrado, li premis sian maldekstran manon sur la nazon kaj buŝon.

La verkisto refoje ekrigardis la horloĝon:

— Sepdek kvin sekundoj — li diris. — Li retiris la mantelmanikon sur la manartikon, kaj delasis la brakon.

La maŝinisto haltis antaŭ ili nur unu spirblovtempon. Li kuris plu al la tankoj, dume kriadante:

— Tiru tuj! La kratero jam duone malfermiĝis suben, ankoraŭ duonminuto, kaj ĝi englitos.

La du muntistoj alportis el la deponejo la tendotolon. La bormastro per konfuzaj okuloj, nekomprene, fiksrigardis ilin, poste ekhurlis, blasfemis kaj kuris post la maŝiniston.

La soldatoj de malproksime komprenis el la signoj, kion ili devas fari, la tri tankoj pigre ekiris dorsdirekten. La ŝnurego malrapide leviĝis de sur la tero, poste ĝi streĉiĝis. Ĝia tintsono ne aŭdiĝis en la surdiga bruo, nur estis videble, ke ĝi vibras, kaj skuas de sur si algluiĝintajn nodojn.

La verkisto atendis, ĝis la du viroj revenos de la tankoj. Ili venis unu apud la alia, la maŝinisto kaj la bormastro, sed ili ne interparolis, eĉ unu vorton ili ne diris unu al alia, ili kondutis, kvazaŭ nenio estus okazinta. La verkisto petis la maŝiniston: bonvolu, diru ion: kia estis tie ene en la fajro, kion li pensis dume, ĝis sur la levaparaton li ligis la dratŝnuregon, kaj entute, kiajn travivaĵojn li havas, ĉar li volus skribi pri tio.

— Nenio skribenda estas pri tio — respondis la maŝinisto, kaj mansvingis. — Tiaĵon oni faras ne por ke aliaj rakonti pri tio. — Ankoraŭfoje li mansvingis. — Ne ĉi tion oni priskribu, aliaĵon oni skribu, tio estas ja nenio. Sur mia posteno neniu alia farintus alimaniere. Ankaŭ vi ne. — Ne estis ironio en lia voĉo, la verkisto tamen sentis tiel, ke li diris tion ironie.

— Mi ne kuraĝus fari tion — li diris tre sincere.

— Nu bone, vi estas pita malgranda homo, magra homo. Ne tio estas ja via fako. — Li montris al la bormastro: — Ankaŭ li ne estus farinta alimaniere sur mia posteno.

— Mi ne lasis, ke vi iru — diris la bormastro.

— Jes, vi lasis.

La verkisto rigardis esplore la viron, li volus scii pli multe pri ili. Li demandis de la maŝinisto:

— Pri kio do mi skribu. Mi petas vin, diru!

La maŝinisto kuntiris siajn okulojn, li havis nigrajn brovojn (similajn al balaileto), kiel aktorino, tamen ankaŭ sekve de tio li ne havis pli belan vizaĝon:

— Pri tio vi skribu, kiam ni estis kaptitoj. Mi malsaniĝis je disenterio, kaj ne povis elteni, ke mi ne manĝu la sukeron.

— Lasu tion! — interrompis la bormastro.

— Kvar kubetoj estis la porcio tage, — kaj demande li rigardas la alian homon: — Ĉu estis tiom?

— Jes, tiom estis.

— Kompreneble mi ne saniĝis. Tiam li, la ĉefo (tiam li ankoraŭ ne estis ĉefo, tamen mi diras nur tiel) forprenis de mi tiun porcion ĉiumatene, ekskrapis el mia mano, kaj metis en tolosaketon, kiun li portis sur sia kolo, kiel aliaj la krucon aŭ la „mortoslipon". Mi ekmalamis lin. Mi estus povinta lin mortigi, sed mi estis tre febla kaj ne kuraĝis tion.

— Estis antaŭ longe, ne havas sencon paroli pri tio. — Sur la diketan vizaĝon de la bormastro streĉiĝis protesto, senindulga kontraŭdiro, sed lia voĉo sonoris senforte, apenaŭ estis aŭdebla pro la bruado de la puto.

— Estis antaŭ longe — kapbalancis la maŝinisto, li klinis sin al la orelo de la verkisto, kaj tiel daŭrigis la historion: — Iun nokton mi ĝisatendis, kiam li ekdormis. Mi sciis, ke li gardas la sekreton sub sia kapo. Mi atendis, mi diras, ke li ekdormu, kaj provis eltiri ĝin el sub la kapo. Li vekiĝis. Li kaptis mian manon. Mi pensis, ke li batos min, kaj pro mia timiĝo mi volis kriadi. Li ne batis min, nur ekpremis mian manon, kaj kiam mi kriis la unuan fojon, li fermis mian buŝon. Mi baraktis, mi ĵetadis min sur la kuŝbenko (lignokuŝejo), li atendis, ĝis mi laciĝis, tiam li lasis min.

Rapide mi laciĝis, tiutempe mi estis tre senforta, la disenterio kaj ĉio alia. Poste mi resaniĝis. Kaj ĉu vi scias, kion faris la ĉefo?

La bormastro ekprenis la magran brakon de la verkisto.

— Egalas, kion mi faris. Ne zorgu pri tio. Venu, mi proponas al vi ion, mi havas bonan, hejme kuiritan brandon. — Kaj li ŝovis lin en direkto de la barako.

— Tiam li faris tion — daŭrigis la maŝinisto —, ke li redonis la sukeron. Ne por unu fojo, ne, por ke ĝi ne malutilu: ĉiutage kvin kubetojn, kvin kubetojn da sukero. Tiel mi manĝis ĉiutage naŭ kubetojn, duoble pli, ol la ceteraj. Mi sciis, kiom da kubetoj estas ĉe li, mi sciis ankaŭ tion, kiom li forprenis de mi. Mi kalkulis tion. — Li ridis per groteska grimaco: — Mi ne havis alian farotaĵon. Kion vi pensas, kiom mankis el la sukero?

La verkisto kapneis: li tute ne scias tion. Li rigardis angore de sur la unua viro al la alia.

— Entute mankis du kubetoj. Ĉu vi komprenas? Du kubetoj tie, en la tendaro. Li redonis al mi ducent ok kubetojn da sukero, la unuan tagon tri, poste ĉiutage po kvin. Li rigardis antaŭ sin sur la teron, kaj kapbalancis: Ducent ok, tiom estis, kaj pri tio vi skribu, tio ja estas la „io". La puto estas nur puto, eĉ kiam ĝi brulas. — Li lasis ilin tie.

Tiam ekaperis la plumpa, sombra bloko de la levaparato, ĝi treniĝis senpove ĉe fino de la dratŝnurego, kvazaŭ knedis antaŭ si la koton, kiu estis griza kaj jododora.

La bormastro revokis la verkiston en la barakon. La verkisto sidiĝis sur angulo de la ilara kesto, sur sia antaŭa loko. La bormastro deprenis super sia kapo litran, plektaĵan botelon de sur la nerabotita breto.

— Pruno, hejme kuirita brando — li diris. Li ĉirkaŭrigardis: Mi havas nur akvoglason, ĉu bone?

La verkisto kapneis, kaj demandis:

— Ĉu vi ne vokos la maŝiniston?

— Vane mi invitus lin.

— Mi ne komprenas vin, vere mi ne komprenas tiajn homojn.

— *Ĉaa* vi estas ankoraŭ juna viro,

— Li diris tiel: „*ĉaa*" sen la konsonanto *ro*, kvazaŭ jam ĝis nun li estus multe trinkinta. Li verŝis po duono da akvoglaso da brando. En lia larĝa manplato krakis la botelo-prenilo, plektita el vergoj, la verkisto vidis, ke li verŝas ĉiam apud la botelon. — Nu, je via sano! — li levis sian glason.

Ili glastintis. La brando estis glata kaj bongusta, ĝi lasis sin trinki, ĝia moskatela aromo restis tie en la buŝo, en la nazo.

— He-he! — diris la verkisto, kiam li lasis sur la genuon la glason. Antaŭ ol li estus povinta pli diri, li sentis, ke varmo superflugas el sia torako sur la cerbon.

— Itala blua pruno kaj „bestercei" — klarigis la bormastro. Li klakis du-tri per sia lango: — Tiel oni faru — langoklakis ankoraŭ unu — kaj poste la gusto fariĝos pli klara.

Ankaŭ la verkisto klaketis per la lango.

— Tiun sukero-historion vi ne atentu — diris la bormastro —, tiun vi ne skribu. Nenio estas en ĝi por skribado.

— Sed jes, kiel do ne estus!

JANUS PANNONIUS
1434—1472

Janus Pannonius, la plej granda hungara poeto de la humanismo, estas ĉe ni solenata ĉi-jare, okaze de la 500-a datreveno de lia morto. Li verkis siajn poemojn ekskluzive latine, estante sub forta influo de la italaj humanistoj, precipe de sia majstro *Guarino de Verono*, al kiu li dediĉis unu el siaj plej belaj panegiroj.

H. V. jam memoris pri li en 1962 (N-ro 3.) Tie estas rakontita lia junula poeto-gloro en Italo; lia favorateco ĉe reĝo Matiaso, kies kortega poeto li fariĝis; lia kariero kiel kanoniko kaj episkopo; lia konflikto kun la reĝo, lia rifuĝo kaj morto.

Pri lia gloro kaj falo, morto kaj senmorteco nun la „Literatura Teatro" en Budapeŝto prezentas teatraĵon verkitan de *Géza Hegedűs:* „Vetfluge kun la ventoj". La teatraĵon oni povus nomi popular-instrua: ĝi celas konigi en dramaj scenoj la vivon kaj poezion de Janus.

En la komenco, Janus Pannonius, rifuĝante antaŭ la kolero de reĝo Matiaso, vivas, mortmalsana, la lastan nokton de sia vivo en Ursoburgo apud Zagrebo, kaj tiam en lia febrosonĝo trapasas antaŭ li lia tuta ĝistiama vivo. Ni vidas lin en la sunluma, tenere brakumanta Italio, kies ĉarmon plidolĉigas al li tri allogaj amatinoj; ni vidas, ke de tie, ne sen animlukto kontraŭ si mem, li revenas al la pli severklimata kaj barbara Hungario, kiun oni devus sekurigi kontraŭ la turkoj. Reĝo Matiaso tamen prefere plektas planojn pri okcidentaj sukcesoj: jen estas la nodo de la konflikto, kiu lian onklon, Johanon Vitéz, episkopon kaj reĝan kancelieron kaj kune lin mem oponigas al la reĝo.

Propre la agado de la teatraĵo estas nur fadeno, sur kiun estas metitaj kiel perloj la poemoj de Janus dirataj aŭ de li mem aŭ de du versdirantoj. La protagonisto, *Tibor Bitskey,* pleje sukcesas tiam, kiam plenajn aŭ preskaŭ plenajn poemojn li povas reciti per sia plaĉkonkere agrabla voĉo. *János Zách* tre simpatie prezentas la rezolutan humanismon de la maljuna Johano Vitéz, kaj *Géza Tordy* povas bone sentigi la altan intelekton de reĝo Matiaso. La politikajn diskutojn la aŭtoro redaktis kun granda rutino, tamen ili estas kelkfoje lacigaj.

Okaze de la jubileo, la Eldonejo de Lernolibroj aperigis ĉiujn poemojn de Janus Pannonius en dulingva, latina kaj hungara eldono.

Por citi ion de Janus Pannonius, ni represas ĉi tie du liajn poemojn en E-a traduko.

JANUS PANNONIUS

PRI TRANSDANUBA MIĜDALARBO

Tian nek Heraklo vidis en ĝarden' de la Hesperidaj,
nek Uliso, la heroa, sur insul' de Alkinoos'!
Ĝi miraklus eĉ sur riĉa kamp' de l'Insularo Feliĉa.
Kiel ne sur friskaj nordaj gleboj de l'Panonia ter'?
Vidu, la migdalarbeto floras en la vintro kuraĝe,
sed burĝonojn, la mirbelajn, kovros al ĝi froste la prujn'.
Migdalarbo, eta Phillis, ne revenis jam la hirundoj!
Ĉu l'printempon junan tiel sopirege atendis vi?

POR LA PACO

Dio, ho, vi granda estro en la ĉielo trans la steloj,
milde alrigardu nian turpan teron, kie milit'
frenezega pereigas pacon, kaj kie Mars' kuregas
tintigante glavon. Siro! Ekstermiĝas are la viv'!
Ho, ĉi teron benu, Patro: al popol' trankvilo necesas,
doloregas batalvundoj kaj tiele trista la mort'!

K. Kalocsay.

— Tiaĵon oni faras ne por ke iu skribu pri ĝi.

— Tio estas la plej bela en la afero. — La verkisto rimarkis, ke la bormastro protestas preskaŭ laŭvorte per tio, kiamaniere la maŝinisto protestis, tio estis stranga.

— Ankaŭ li ne ĝojus pri tio, la maŝinisto.

— Do tamen kial tion li rakontis?

— Pro sia nervoza stato. Ĉu vi ne vidis, kiom nervoza li estis?

— Se tio okazus al mi, mi estus eĉ pli nervoza.

— Ne nur pro tio li estis nervoza, sed ankaŭ pro alia afero.

— Mi ne komprenas vin, je Dio mi ne komprenas. — Kaj ĉio ekŝanceliĝis en li kaj sentis kvazaŭ li fariĝus facila.

— Kion vi do ne komprenas?! — alkriis lin la bormastro.

La verkisto ekridis:

— Inter vi troviĝas io, jes, io, pri kio vi ne parolas.

— Sed kion vi ne komprenas?! — Pro la subite estiĝinta pasio la vejno dike ŝveliĝis meze de lia frunto, kaj krucforme transpontis la profundajn sulketojn de la karnecaj faltoj.

— Vi parolas ĉiam pri alia afero.

— Forlasis lin la edzino, ŝi lasis lin sola. Ĉu vi jam komprenas?

— Ĉu la edzino? Ĉu la maŝiniston? — La verkisto sobriĝis pro la surprizo.

— Jes, la edzino, la maŝiniston.

— Kaj kie nun ŝi estas?

— Prefere demandu tiel: ĉe kiu ŝi estas? Jes, tiel demandu: ĉe kiu?

La verkisto skuis sian kapon: ne, ne povas esti vera.

La bormastro balancis la kapon: sed jes, tio estas tiel.

— Vi estas verkisto — li diris poste kviete —, vi scias, kiel tiajo okazadas. — La vizaĝo fariĝis loza, maljuna, la verkisto ĝis nun supozis, ke li estas kvardek-jara, sed nun subite li ne kapablis juĝi pri tio, ĉu li ne estas pli ol kvindek-jara.

La verkisto levis la glason de sur la genuo. Ili tintigis kaj trinkis la restaĵon.

— Ni atendas nun la internan disfalon, tiu ja estingos ĝin — klarigis la bormastro per oficiala tono, kvazaŭ ili ĝis nun pri nenio alia parolus, nur pri la puto. — Griza flueca sablo troviĝas ĉi tie, en profundeco de mil ducent metroj, malsupren la akvo ellavos ĝin kaj okazos la disfalo. Unu tago aŭ du tagoj, kaj pretas: finiĝis la fajro.

— Jes, finiĝis la fajro — ripetis la verkisto mekanike, prenis la notlibreton, la fontplumon, por notadi.

Trad. *L. Kökény*

panoramo



Malnova hungara arto — jen estas la titolo de ekspozicio, kiu malfermiĝis en Romo, en Palazzo Venezia, unu el la plej belaj kaj konataj renesanc-epokaj artmonumentoj kaj plej altrangaj muzeoj de la itala ĉefurbo.

La ekspozicio prezentas la plej belajn artobjektojn ekde la epoko de la hungara patrujkonkero (9a jc.) ĝis fino de la 17a jc. La riĉa elektaĵo konsistas el materialo de ĉ. 30 hungaraj muzeoj kaj kolektaĵoj. Ĝenerale ĝi similas al ekspozicioj, spektataj pli frue de la publiko de Parizo, Londono, Moskvo kaj Leningrado, kiuj rikoltis ĉie grandan sukceson: ĉ. 300 pentraĵoj, statuoj, kodeksoj, miniaturoj, oraĵoj, ceramikaĵoj, teksaĵoj kaj mebloj.

Por kompletigo estas prezentita ankaŭ popolarta elektaĵo el la sama tempo.

***

Unu el la plej grandaj simfoniaj orkestroj de la mondo preparas sin al rara festo en historio de muziko. Temas pri la Filadelfia Orkestro, kies hungardevena dirigento, Jenő Ormándy transprenis la dirigentan bastoneton el mano de Stokowski kaj nun li estras la orkestron jam ekde tridek kvin jaroj. Ormándy finis siajn studojn en la Budapeŝta Muzikakademio, kaj tiutempe li vekis sensacion kiel miraklo-infano de la violono. Ormándy nun fariĝos 73-jarulo. Je la demando, kiam li intencas demeti la sorĉan bastoneton, li respondis jene: en tiu tago, kiam mi mortos.

La 10-an de aprilo 1847, do antaŭ 125 jaroj naskiĝis Joseph Pulitzer, la hungardevena usona gazeteldonisto. Li estis la redaktoro kaj eldonisto de „St. Louis Post Dispatch", poste de „New York World" kaj „Evening World", dum jaroj vicprezidanto de la „Pulitzer Publishing Co". Pri li oni nomis la ĵurnalistan, verkistan, muzikan premiojn, disdonitajn ĉiujare en Usono.

***

La ĉi-jara Foiro de Leipzig altiris pli ol naŭ mil ekspozantojn de sepdek landoj en tiun ĉi 800-jaran famegan foirurbon. „Por la mondkomerco kaj teknika progreso" — tio estis la devizo de la Printempa Foiro. 150 industriaj kaj eksterlandkomercaj entreprenoj de Hungario ekspoziciis siajn produktaĵojn en la pavilonoj de HUNGEXPO, ankaŭ nun aranĝitaj sur alta nivelo. Je la oraj medaloj de la Foiro estis anoncitaj pluraj hungaraj novaĵoj, kaj ĉifoje ricevis oran medalon denove tri hungaraj produktaĵoj: la hidraŭlika dispeciga maŝino, centralo-aparato kun alta precizeco kaj impulso-bruokalkulio. La fakuloj por ĉiuj tri novaĵoj eksterordinare interesiĝis.

La unuan fojon gajnis hungara eksterlandkomerca entrepreno la premion „Ora Merkuro", kiu esprimas rekonon de la Eŭropa komerco. La prezidantaro de tiu ĉi internacia premio, fondita en 1961 kaj aganta en Romo, publikis, ke la hungara entrepreno TERIMPEX ricevis la honorigan premion por la rezultoj atingitaj en la ekonomia kunlaboro.

En la antaŭaj jaroj ricevis tiun ĉi signifoplenan premion la svedlanda automobil-fabriko Volvo, la Daimler-Benz-Mercedes en Stuttgart, la Italia Navigacia Entrepreno en Genova; el la socialismaj landoj fariĝis posedanto de la grava premio la Ĉehoslovaka Pilsner Urquell.

***

La „Prix Japon" premio kaj diplomo estis solene transdonita en Budapeŝto por la distingitoj de la 1971-jara internacia konkuro pri sciencpopularigaj programoj en Tokio, al la scienca esploristo d-ro Péter Szőke kaj la redaktoro Géza Simonffy, konekse kun programo de la Hungara Radio: „La malkovro de la birdovoĉo".

panoramo



La Vojaĝoficejo IBUSZ eldonis la unuan katalogon pri la hungaraj sanigbanejoj, kiu prezentas detalan informadon pri la sanigbanejoj de Hungario. La katalogo aperis en angla, germana kaj franca lingvoj, sume en 50 mil ekzempleroj. Oni planas aperigi la sekvan eldonaĵon en la lingvoj de la skandinavaj landoj, ĉar en tiuj landoj oni tre interesiĝas pri la hungaraj sanigbanejoj.

Samtempe kun la aperigo de la eldonaĵo la Ĉefurba Banejdirekcio kaj la gvidantoj de IBUSZ subskribis interkonsenton, laŭ kiu en la banejo Gellért estu organizataj por niaj eksterlandaj gastoj kuracado en la fremdultrafikaj antaŭ- kaj postsezonoj, respektive en la vintra sezono, sub gvido de fakkuracistoj.

***

En la internacia kartografia ekspozicio en Cipro, kie oni prezentis la mapojn de 32 landoj, unu el la grandpremioj de la ekspozicio ricevis industri-statistika mapo de la Hungara Kartografia Entrepreno. En la ekspozicio reprezentigis sin ankaŭ UNESCO kaj FAO.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze ebligas la manĝadon por turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

ĈAPITROJ EL LA HUNGARA MUZIKHISTORIO

III. Baroka muziko en Hungario

En la lastaj jardekoj la intereso de la eŭropaj muzikamantoj turnis sin kun granda intenseco al la baroka muziko t.e. al la okcidenta muziko de la 17—18. jarcentoj. Estas interese, ke ĝuste ĉi tiu muzikstilo estas tiu, kiu aperas plej unue en la hungara arta muzikkulturo.

Unu el la plej karakterizaj trajtoj de la baroka stilo en la muziko estas la memstara instrumenta kulturo. Ĝi do signifas apartan ĉapitron de la muzikhistorio.

Ĉi tiu muzika stilepoko aperas en la hungara muzikhistorio plej unue en eksterlandaj — okcidenteŭropaj fontoj. En Hungario tiutempe oni verŝajne ĉiam improvizis la memstaran instrumentan muzikon, do la dancmuzikon. En multaj okcidenteŭropaj notlibroj ofte estas troveblaj dancpecoj, titolitaj „ungaresca"; tio montras, ke en tiu mondoparto oni alte taksis la eksterlandan nacikarakteran muzikon. La orienteŭropa muziko fariĝis modo en tiu tempo. Samtempe en diversaj notlibroj ankaŭ aliaj naciaj muzikpecoj aperis („polonico" — polonezo — „spaniel" ktp.).

Hungario mem havis en la 17. jarcento ne nur popolmuzikan kulturon. En multaj aristokrataj palacoj kaj kortegoj oni ludis ne nur eksterlandajn, sed ankaŭ hungarajn kompoziciojn. Multaj mondfamaj muzikistoj naskiĝis kaj pasigis sian junecon en Hungario. Siatempe la tuta kultura mondo konis la nomon de la kortega liutisto *Bálint Bakfark* (sub la nomo de Valentin Gref; 1507—1576.) Lia vivo estis riĉa je vojaĝoj, grandaj artaj sukcesoj — kaj politikaj-diplomatiaj agadoj.

Unu el la prauloj de la komponisto-giganto *J. S. Bach* vivis dum kelke da tempo en Hungario. (J. S. Bach mem mencias inter siaj antaŭuloj „bakiston en Hungario").

Sigismundo Kusser (1660—1727), kiu fariĝis je la fino de la 17. jarcento unu el la grandaj individuoj de la Hamburga opero-teatro, naskiĝis ankaŭ en Hungario (en la hodiaŭa Bratislava).

La 17-an jarcenton karakterizas en la historio de Hungario la disiĝo. La lando disfalis en tiu tempo je tri apartaj partoj. *Transsilvanio* estis pli-malpli memstara suverena lando; la parto, kiun okupis la turkoj, kuŝis meze en la lando, kaj la turkoj klopodis pligrandigi tiun havaĵon je malavantaĝo de la dinastio Habsburg, kies teritorioj kuŝis en Transdanubio kaj en la montaj partoj norde de ĝi.

La historiaj kantoj iom post iom malaperis; anstataŭ ili ekfloris la reprezenta muziko en la nobelaj kaj reĝaj kortegoj. Fondiĝis orkestroj, ofte estis aŭdeblaj la sonoj de violono, virginalo (aŭ klavikordo), trombono, eĉ kelkfoje de sakfajfilo. Ĉi tiuj muzikinstrumentoj eksonigis la tiel nomatan tablomuzikon de la aristokratoj. Sed la altnivela muzikkulturo trovis hejmon ankaŭ en kelkaj urboj, precipe en tiuj, kie germandevenaj majstroj laboris kaj vivis.

La nereligia — sekulara — hungara instrumenta muziko de tiu, jarcento estas notita en kvar multvaloraj fontoj; inter ili du estas kodeksoj (malnovaj manskribitaj, binditaj libroj) kaj du virginallibroj. — La virginalo — la antaŭulo de la hodiaŭa fortepiano, havas, kiel ĉi tiu, klavaron, per kiu ĝi sonigas la malantaŭe lokigitajn kordojn per la surklave fiksitaj t.n. tangentoj. La virginalo — kies alia nomo estas klavikordo — ebligis al la ludanto per meĥanika mallongigo de la kordoj eksonigi pli da sonoj ol la nombro de la kordoj. Kompreneble, ne estis eble eksonigi pli da sonoj, devenantaj de la sama kordo. La plej grava elemento de la klavikordo-muziko do estis la ornamado de la melodio. La sono de la klavikordo (virginalo) estis malforta kaj efemera; pro tio la ornamado de la sonoj per movemaj, multfiguraj melodioj estis memkomprenebla afero.

Cetere, la kolektoj de la instrumenta muziko en la 17-a jarcenta Hungario realigas la amikecon de la ĉedanubaj nacioj, enhavante ne nur hungarajn dancmelodiojn, sed aliajn pecojn, kies titolo estas „Rumana danco" ktp., ankaŭ „Polonica" dancon oni trovas en ili; inter la titoloj aŭ eĉ tekstoj estas troveblaj ankaŭ slovaklingvaj. La tekstoj pruvas, ke multaj el la kompozicioj estas kantoj, kiujn oni efektive kantis kaj ĝenerale konis.

La notado de la melodioj okazis ofte per la t.n. *tabulaturo*. Ĉi tio estas frua formo de la muziknotado por instrumentoj, kiu konsistas el sistemo de literoj kaj aliaj signoj — strekoj, punktoj ktp. La tabulatura sistemo, trovebla en la hungaraj kodeksoj estas la germana, ĉar la notadsistemoj akomodiĝas al la lingvoj, alternas do laŭ la lando, kie ili estas uzataj. Ĝin uzis ankaŭ la germanaj majstrokantistoj.

La menciitaj melodioj estas precipe valoraj, ĉar ili estas certe plejparte la unuaj skribe fiksitaj de la hungara muzikkulturo. Ĉi tiujn melodiojn en sia tempo — do en la 17-a jarcento — oni ĝenerale konis kaj kantis.

(Daŭrigota)
D-ro Lajos *Lesznai*

LABORLOKO—NIA DUA HEJMO!



DOMUS

KOMFORTA KONTORGARNITURO—PLI BONA LABORO!

Ni entreprenas kompletan instaladon de sociaj kaj kulturaj institucioj per mebloj planitaj laŭ serioj aŭ por individuaj bezonoj. Ĉiaspecaj kontormebloj ankaŭ por tuja livero.

GRANDA ELEKTEBLO!

Establa Fako de
MEBLOVENDA ENTREPRENO

BÚTORÉRTÉKESÍTŐ VÁLLALAT
Létesítmény berendezési osztálya

Budapeŝto, XIII., Jász utca 5—7.

Malfermita: de lundo ĝis vendredo de 8-a ĝis 17-a horoj.

BUDAPEŜTO JUBILEAS

La ĉi-jaran septembron kunvenis en Budapeŝto la gvidantoj de la Eŭropaj ĉefurboj kaj pritraktis la eblojn de la kunlaborado, kaj la bazajn problemojn de la urbogvido, evoluigo kaj urbregulado.

Por la renkontiĝo de la Eŭropaj urbestroj donis okazon la fakto, ke ĝuste antaŭ 100 jaroj la hungara parlamento decidis per leĝo XXXVIa el 1872, unuigi la tiamajn urbojn BUDA, ÓBUDA (Malnova Buda) kaj PEST, kiuj havis ĝis tiam propran aŭtonomion. La pligrandiĝintan urbon samtempe oni deklaris la unuan fojon definitive ĉefurbo de la lando, sub nomo BUDAPEST.

La invito de la gvidantoj al internacia renkontiĝo fare de la magistrato de Budapeŝto estas unu el la datrevenaj festaj aranĝoj.

Ĉi-okaze povas esti interesa iom ekscii pri la historiaj antaŭaĵoj. En la tempo de la patrujkonkero fare de niaj prauloj (9a jarcento), oni ankoraŭ ne povas paroli pri ĉefurbo en moderna senco. La regnestro kun siaj servistaro kaj kortegano migradis de parto al parto de la lando, kaj pasigis pli-malpli da tempo sur lokoj, kie oni kolektis la naturaĵojn (bestojn, grenon, vinon ktp) kiel imposton de la subuloj. La provizaĵoj estis samloke konsumitaj. La regnestro profitis tiujn vojaĝojn por pritrakti la landajn aferojn kaj persone praktiki sian jurisdikcion. Kun la tempo la regnestroj elektis fiksan sidejon, konstruigis palacon aŭ preĝejon destinatan por kronado aŭ entombigo. Post la enkonduko de la skriba formo de la administrado (12a jc.), la eldonloko de la dokumentoj aludas al centra loko. Tiamaniere en nia historio oni rigardas kiel ĉefajn lokojn de nia lando la urbojn Esztergom, Székesfehérvár, Buda, Temesvár, Visegrád. Inter ili BUDA (siatempe la nuna Burgmonto) iĝis, jam en la mezo de la 12a jarcento, la centro de la ŝtatadministrado. Nome post la ĉeso de la tatara-mongola invado (1241), la reĝo Adalberto IVa transdonis sian palacon en Esztergom al la tiea ĉefepiskopo kaj elektis por nova reĝa rezidejo la urbon Buda fortikigitan per ŝtonmuroj. Tiu situacio stabiliĝis kaj Buda konservis sian politikan signifon sendepende de tio, ke norde elformiĝis la aŭtonoma Malnova Buda (la nuna IIIa distrikto de Budapeŝto) kaj sur la transa bordo de Danubo la urbo Peŝt. Kun la tempo la du Buda-aj urboj geografie kontaktiĝis, kaj en la jaro 1849 ankaŭ la kontraŭborda urbo Peŝt estis ligita al Buda per la unua konstanta ponto nomata Ĉen-, aŭ laŭ la iniciatoro, Széchenyi-ponto. Maturiĝis la kondiĉoj al la kunfandiĝo. Vere jam en la tempo de nia liberecmilito kontraŭ la Habsburga regado en 1848/49, la hungara revolucia registaro ordonis unuigi la tri urbojn kaj deklari ĝin ĉefurbo. Pro la falo de nia liberecmilito tiu plano ne povis realiĝi. Nur post la kompromiso inter la dinastio kaj hungara nacio, en 1872 naskiĝis tiu leĝo, kiu definitive solvis la problemon. La realigo postulis zorgajn antaŭpreparojn (divido de la loĝkvartaloj disde la industriaj periferioj, akvokonduko, kanalizado, administradorganizo ktp). La unua ĝenerala kunsido de la nova ĉefurba magistrato okazis la 25-an de oktobro 1873, kies centa datreveno estos festata per scienca sesio fare de la Hungara Scienca Akademio, Budapeŝta Historia Muzeo kaj Ĉefurba Arkivo.

Grava mejloŝtono estas la unuiĝo en la historio de Budapeŝto. Elleviĝante el la vico de la provincaj magistratoj, konforme al siaj specifaj cirkonstancoj, ĝi ricevis eblon — simile al la eksterlandaj metropoloj — al sendependa establo. Tiu periodo koincidas kun la urbaniza procezo, kiu karakterizas tutan Eŭropon meze de la pasinta jarcento. Tamen estis diferenco inter Okcidento kaj ni. Okcidente, en la kapitalismaj landoj elformiĝis tuta reto de grandaj urboj, dum ĉe ni la urbanizado koncernis preskaŭ nur la ĉefurbon. Ĝi fariĝis la sole ebla centro de la politika, ekonomia kaj kultura vivo. Ĝi rapide kreskis granda urbo, la nombro de loĝantaro nun atingas jam rondcifere du milionojn, do la kvinonon de la dek-miliona tutlanda loĝantaro. Certagrade tio ne estas sana stato, ĝuste pro tio oni nun strebas plirapidigi la plenan urbanizadon ankaŭ en la provincaj urbocentroj.

Nia liberiĝo el la faŝisma danĝero donis eblon meti nian politikan, ekonomian kaj kulturan vivon sur novan socialisman bazon. Sekve de tio, nia popolo mirinde rapide ne nur rekonstruis nian ĉefurbon el la teruraj ruinoj, kaŭzitaj de la totala mondmilito, sed povis iniciati radikalan socian metamorfozon, sukcese plenumi la kvinjarajn ekonomiajn planojn, kaj en ties kadro daŭrigi la urbanizan procezon en racia direkto. Ties karakterizaĵo estas, ke la specifa, ekskluziva ekonomio de la grandaj urboj progresive transformiĝas je integra parto de la tuta nacia ekonomio.

Por fini: krom la menciitaj festaj aranĝoj, la Budapeŝta magistrato, je honoro de la centjara datreveno, zorgas pri riĉa programo, en kiu troviĝas: inaŭguro de monumento sur la Margaretinsulo; memor-ekspozicio en la Burgo; eldono de diversaj fakaj kaj popularaj memorlibroj kaj de okazaj poŝtmarkoj; artaj programoj; renkontiĝo de la hungaraj urboj somere de 1973.

Novajn perspektivojn malfermas por la evoluo de nia ĉefurbo ankaŭ la ĵus validiĝinta nova leĝo pri la Konsilantaroj, kiuj iĝis ankoraŭ pli liberaj mastroj ol ĝis nun en urbogvidaj aferoj.

Jozefo Mátéffy



B
fűszért

EXTRA
ROPOGŌS
OSTYĀK
NAGY
VĀLASZTĒKBAN

Budapesti
Fűszer és Édességnagykereskedelmi Vállalat

VAFLOJ
EKSTRAJ
KRAKETANTAJ
EN GRANDA ELEKTEBLO

BUDAPEŜTA
Pogranda Komerca Entrepreno
de Spico- kaj Dolĉaĵvaroj



Maketo de la akvonodo

Tibor Dóra — Dr. Ottó Haszpra

LA AKVONODO

En la orienta parto de Hungarujo apertenanta al la baseno de la rivero Tisza (tisa) la pluva precipitaĵo dum la produkta sezono de la agrikulturo estas relative malalta, multloke ĝi estas eĉ sub 300 mm-oj. Altgrada agrikultura produktado estas neebla sen *akvumado.*

La rivero Tisza estas signifa *transportlinio* de la varoj produktataj en la Tisza-baseno, tamen ĝi ne povas esti utiligata tiamezure, kiom estus necese, ĉar dum la

ATTILA HLAVATY

PSEŬDA PSALM'

Pia, povra pseŭda psalm'
petegu por puruloj,
lante lirlu laca larm'
el oldaj onklokuloj
pro nia sink' morala,
kun senterupt' madala
ve, revokiĝu orepok'!

Mava, magra memmarot'
recitu instruiste,
kiel kontraŭ karna kot'
adore, altruiste
vi venkis la libidon! —
sekretenvie idon,
nur ĉasti ja kapablas mem.

ANDOR BÚZÁS

MIA VIVO

Kiam mi naskiĝis
oni jam stebadis la soldatŝuojn
de baptopatro mia,
kiuj poste frostgluiĝis al Donbordo;
Jam pretaj estis la trumpetoj
por kraki valsojn
sur la Buchenwald-kajo.

Kiam mi mortos
jam startos revene la unua
ekspedicio
alastriĝinta planedon de l'Blua
Stelo,
sed ekmoviĝi ne povinta,
ĉar la homokulojn ankoraŭ
mordis la fumo
kaj en la sekuraj titan-alojaj
tegiloj
iliaj piedoj frostiĝis.

Trad. *P. Rados.*

DE KISKÖRE

sekaj sezonoj nenia iom granda ŝipo povas trapasi la malprofundajn vadejojn estiĝantajn multloke en la fluujo.

La *elektra energioproduktado* de Hungarujo baziĝas je termoelektraj centraloj. Sed tiaj centraloj ne povas sekvi ekonomie la dumtagan variadon de la elektrokonsumado.

Ĉiuj ĉi tri problemoj povas esti solvitaj ĝis certa grado per estigo de plurcelaj *akvonodoj* konstrueblaj kelkloke en la fluujo de la Tisza.

Akvonodo estas speciala hidroteknika konstruaĵo, kiu igas la akvon ŝveli super sian originalan nivelon por diversaj celoj, kaj kiu povas konsisti el pluraj partoj.

La *ŝveliga digo*, konsistanta kutime el fiksaj kaj moveblaj partoj, servas nur por levi la surfacon de la akvo al iu difinita nivelo. Estigo de simpla ŝveliga digo ebligas elprenon de la akvo el la fluujo de la rivero per simplaj „gravitaciaj" kanaloj, do sen ia ajn pumpstacio. Tiel ĝi povas servi por irigacio, t.e. por provizi akvon al la akvumendaj teritorioj. Se la artefarita lago, la rezervujo, estiĝanta super la digo estas sufiĉe granda, ĝi povas konservi la akvon de la vintra sezono por la agrokultura periodo.

Alia parto de la akvonodo povas esti la *navigacia kluzo*. Ĉar la nivelo de la akvo super kaj sub la ŝveliga digo ne estas la sama, navigacio povas okazi nur, se ankaŭ ŝipo-kluzo estas konstruita, kiu ebligas al la ŝipoj trai la nivelodiferencon. Do dum la ŝveliga digo ebligas navigacion en la supra akvoregiono, la navigacia kluzo estigas ties kontakton kun la malsupra akvoregiono.

La tria parto de la akvonodo povas esti la *energiocentralo* aŭ energio-produktejo kiu, lasante flui tra si ĉiusekunde certan kvanton da akvo, transformas ties potencialan energion en elektran energion per turbinoj kaj generatoroj.

Laŭlonge de la rivero Tisza tiaj akvonodoj estas konstruitaj, konstruataj kaj planataj. Ili konsistas el ĉiuj tri menciitaj partoj, do *ŝveliga digo* (kun moveblaj fermotabuloj) por ŝveligi la akvon por la celoj de la irigacio, navigado kaj elektroproduktado, *ŝipokluzo* por ebligi navigacion tra la akvonodo, kaj *energioproduktejo* por produkti elektran energion ĉefe en tiaj periodoj de la tago kiam la konsumo estas alta (ekz. dum la vesperaj horoj).

La unua akvonodo estis konstruita en 1959 ĉe Tiszalök (tisalek) en la supra sekcio de Tisza. La sekva akvonodo sub ĝi nun konstruiĝas ĉe Kisköre (kiŝkere). Aliaj akvonodoj estas planataj.

Kelkaj el la plej gravaj efikoj de la akvonodo de Kisköre estas la sekvaj:

Konsiderinda parto de la rivero super la akvonodo iĝas artefarita lago, kie 400 milionoj da kubaj metroj da akvo povas esti kolektitaj.

La akvo de ĉi tiu rezervujo servas por 300 000 hektaroj da akvumata teritorio kaj 20 000 hektaroj da fiŝlagaro.

La rivero iĝos navigebla super la akvonodo ĝis Tiszalök por ŝipoj de 1350 tunoj dum la tuta navigacia sezono.

La elektrejo produktos 103 milionojn da kilovathoroj da energio ĉiujare.

La rezervujo, kies surfaco kovros 127 km^2-ojn, kaj tiel iĝas la dua plej granda „lago" de la lando, estos profitebla ankaŭ kiel somera ripozregiono.

La planado de tiel granda establaĵo bezonas multaspecan laboron. Kelkaj problemoj eĉ ne povas esti solvitaj per kalkulado. Tiam la *hidraŭlika modelumado* helpas.

Por solvi certajn problemojn de la akvonodo de Kisköre, ankaŭ hidraŭlikaj modeloj estis konstruitaj kaj studataj. Dum la planado estis farita de la Planista Entrepreno por Akvaj Aferoj *(VIZITERV)*, la modeleksperimentojn realigis la hidraŭlika laboratorio de la Scienca Esplorinstituto de Akvomastrumado *(VITUKI)*. Ambaŭ institucioj havas reputacion kaj en- kaj eksterlande.

En la hidraŭlika laboratorio de VITUKI oni faris diversajn modelojn de la akvonodo: modelon laŭ skaloj 1 : 400 horizontale kaj 1 : 50 vertikale por determini la ĝeneralan aranĝon de la konstruaĵo por certigi la sendanĝeran trapasadon de la superakvegoj kaj la glaciaro, modelon laŭ skalo 1 : 75 por determini la plej favorajn formojn de la bordoj proksime al la elektrocentralo kaj la kluzo. Aliaj modeloj laŭ skalo 1 : 25 estis uzataj por studi la fortojn kaj premdistribuojn, kiuj atakas la ŝveligtabulojn kaj determini la plej efikan energiodividan sistemon rekte post la digo. Aparta modelo laŭ skalo 1 : 25 estis uzata por determini la hidraŭlikajn kondiĉojn ĉirkaŭ la turbino, speciale se okazas neantaŭvidita funkcioeraro ktp. Por la mezuradoj la laboratorio uzas kaj klasikan kaj plej modernan elektronikan instrumentaron.

La *akvonodo de Kisköre* ekfunkcios en 1973.

INTERESAĴOJ

En la Medicina Instrumentafera Instituto de la Sanitara Ministerio estas ekzamenataj jare kaj meznombre 150 novaj instrumentoj. Laŭ la nunaj esploradoj estos utila instrumento la biologia mikro-analizatoro, pretiĝanta ĉe la Etindustria Produkta Kooperativo „Radelkis". Kun ĝia helpo el etkvanta sango estas farebla rapida analizo kun alta precizeco.

Ankaŭ grandan signifon havas la nova, moderna elektronika kirurgia tranĉilo, produktaĵo de la Medicina Instrumenta Etindustria Produkta Kooperativo. Ĝi estas — anstataŭ la tradicia bisturio — la tn. elektra tranĉilo, aplikebla en la kirurgio, kiu servas por ebligi la sensangan tranĉon.

***

La Aŭstralia registaro starigas monumenton en Madang, urbo en Novgineo, por Samuel Fenichel kaj Lajos Bíró. La naturgranda reliefo de la du famaj hungaraj esploristoj estos adaptata en rokoblokon, eltranĉitan el koralrifo. La reliefo enhavos ankaŭ la biografiajn datojn en angla, hungara kaj papua lingvoj.

Pri la taskoj de la scienco

Gazeta deklaro de la Nobelpremiita profesoro D. Gábor

Antaŭ nelonge pasigis kelkajn tagojn en sia naskolando Hungario Dénes Gábor, unu el la grandaj individuoj de la nunepoka fizikoscienco, Nobel-premiito, profesoro de la Londona Imperial College, membro de Royal Society, honora membro de la Hungara Scienca Akademio. Lia multflanka kaj fruktoriĉa agado koncernas tiel gravajn demandojn, kiel ekz-e la t.n. vagaj ondoj, kaŭzitaj de troa streĉo kaj troaj impulsoj, lumiga tekniko, perado kaj rezervo de informoj, transformo de varmenergio rekte en elektran energion, problemoj de kolora televizio ktp. La fama scienculo donis intervjuon al la kunlaboranto de la Hungara Telegrafa Agentejo pri la taskoj de la scienco.

— Nian tempon oni nomas epoko de tekŋika-scienca revolucio kaj inde, ĉar la evoluo de la tekniko donis al ni eblojn, pri kiaj ni eĉ ne sonĝis antaŭe. La homo nun jam atingis la Lunon kaj verŝajne povos iri ankaŭ plu. Tamen, ni emas neglekti la danĝerojn *de tiu evoluo. Miaopinie, nun la plej grava scienca tasko estas studi tiujn danĝerojn kaj ellabori la racian sintenon por ilia prevento.*

— La unua ĉefa danĝero estas, ke la homaro, ĝuste pro la rapida evoluo de la tekniko, tre grandmezure detruas kaj malpurigas sian ĉirkaŭaĵon, precipe la akvon kaj aeron, perturbas la biologian ekvilibron kaj facilanime malatentas, ke tiu trezoro, per kiu ĝi devas mastrumi, estas limigita. La malŝparo de la minerala trezoro, precipe de la petrolo- kaj karbo-provizoj, estas tiel altgrada, ke ĝi sufiĉos, laŭ la kalkuloj, maksimume por cent jaroj.

La energio-stato kaj mineralrezervoj strikte interrilatas kun alia granda problemo, kun tiu de la tropopolumiĝo, kiu en kelkaj landoj, ekz-e en Japanujo kaj Hindujo, jam nun atingis maltrankviligan gradon. Kaj ne estas preteratendeblaj ankaŭ tiaj faktoj kiel la ekstermiĝado de la planktono, kies signoj jam montriĝas en la oceanoj. Kaj ĉi tio tute ne estas bagatelo, ĉar la planktono liveras ĉ. 75—80%-ojn de la ter-atmosfera oksigeno, kaj kune kun la flaŭro havas grandan rolon en la malkompono de la karbona dioksido produktata de la industrio.

— La tasko de la scienco estas do primezuri la situacion, difini precize la eblojn kaj klerigi la homaron. Ĉi-koncerne mi pensas unuavice pri la junularo, kiu nin sekvos kaj kiu responsos pri la sorto de la homaro kaj de si mem, ja por la solvo de ĉiuj ĉi problemoj ni havas maksimume unugeneracian tempon. Ĉar temas pri la savo de la biologia ekvilibro, de la vivkondiĉoj de la homaro, nemezureble pligrandiĝos la signifo de la biologiaj sciencoj, kaj kompreneble ankaŭ la rolo de la fiziko: la leĝoj de la fiziko validas ja ankaŭ pri la biologiaj procezoj. Ni devas kredi je tio, ke posedante grandegajn eblojn, venkos la homa intelekto, kaj profitante la grandegan scion kaj brilajn detal-rezultojn akumulitajn sur la plej diversaj terenoj, kapablos restarigi la harmonion inter la bezonoj kaj ebloj de la homaro — finis profesoro Dénes Gábor sian deklaron.

Tr. *M. Fejes*

Por scienculo nur optimismo estas akceptebla

Intervjuo kun Albert Szent-Györgyi

Bruno F. Straub hungara akademiano telefone intervjuis la Nobelpremiitan hungar-devenan scienculon *Albert Szent-Györgyi*, vivantan en Usono, kaŭze de „Dudek miliardoj da cerboĉeloj". Komence de la interparolo Prof Szent-Györgyi diris, ke la tuta homa progreso estas dankebla al tiuj bazaj esploroj, kiuj siatempe havis nenian praktikan aplikon. Kaj malgraŭ tio, ke la homaro povas danki ĉion posedatan al tiuj esploroj, dum sia tuta historio ĝi elspezis por ili malpli multe, ol kiom la Pentagono, la Usona militministerio, elspezas jare por militaj celoj.

— Por elformi la kulturan idealon de la moderna homo, oni devus instrui en la lernejo ĉefe la leĝojn de la homa kunvivado. Aliaj gravaj aferoj estas la justeco, honesteco, humaneco, la rekono de tio, kun ties ĉiuj konsekvencoj, ke ni estas idoj de la sama raso kaj ne povas vivi unu sen la alia; ke ni povas konservi ĉi tiun teron pura kaj loĝebla nur tiam, se ni agas kune, ne unuj kontraŭ la aliaj.

— Se mi pensus nur je la pereigaj armiloj akumulitaj, min superregus la pesimismo. Sed por la scienculo estas akceptebla, kiel labor-hipotezo, nur la optimismo. Mi kredas, ke la homaron atendas pli bela futuro, ĉar la homara evoluo, homara progreso ne stagnas: ĝi daŭras plu. La kultura progreso min esperigas, ke la homaro tamen plenkreskos foje, kaj post cent aŭ ducent jaroj rigardos la nuntempajn pereigajn armilojn kun tia sama naŭzo, kiel ni rigardas la torturilojn restintajn el la mezepoko. Mian esperon mi bazas sur la junularo, kiu estas freŝa, elasta, adaptiĝema.

La gvidantoj de l' futuro estos la hodiaŭaj junuloj, kaj mi fidas, ke ili konstruos pli bonan, pli justan mondon — finis siajn vortojn profesoro Szent-Györgyi.

Tr. *L. Rieth*

SATURNUS





La frotodiskoj SATURNUS estas nemalhaveblaj iloj de la fajna prilaboro de facoj. Ĉefa avantaĝo de SATURNUS estas, ke ĝi elaste tuŝiĝas sur la malglatajoj de faco kaj tiel krom la glatsurfacaj laborpecoj estas prilaboreblaj la plej diversformaj profiloj, konveksaj kaj konkavaj surfacoj, fleksajoj, internaj kaj eksteraj facoj de ujoj kaj de tuboj.

La frotodiskoj SATURNUS estas fabrikataj kun bortruoj kaj kranoj, krome kun lamenetoj konsistantaj el normalkorundo de F 40—63 grajnograndeco sur bazo balontola. Sur la frontflanko de la frotodiskoj kun bortruo estas lokita ŝtaldisketo por adapteblo sur la maŝinon. La tenildiametro de la kranhavaj frotodiskoj estas 6 kaj 9 mm.

Dum la uzo de frotodiskoj ĝis la plena erodiĝo daŭras la bona poluremo kaj ekonomieco. La teknikajn indikojn de la frotodiskoj SATURNUS resumas sekva tabelo:

	Diametro mm	Largo mm	Rekomendita rivolunombro n/min
kun krano	35	25	16.000 ĝis 19.000
	60	25-50	9.500 ĝis 11.000
	90	25-50	6.300 ĝis 7.400
kun bortruo	175	25-50	3.200 ĝis 3.800
	250	25-50	2.300 ĝis 2.700
	300	30, 50, 100	1.900 ĝis 2.100
	400	50, 100	1.500 ĝis 2.700

FABRIKANTO KAJ VENDANTO

GRANIT

FABRIKO DE FROTODISKOJ KAJ ŜTONVAZOJ

BUDAPEST, XIX. FADRUSZ JÁNOS UTCA 2.

TELEFONO: 471-118 TELEX: 3467 GRANIT BUDAPEST

CS K GY GRANIT

La tragedio de l' homo en Estonio



„La tragedio de l'homo" de Imre Madách aperis antaŭnelonge en la estona lingvo; ĝin tradukis Jaan KROSS (nask. en 1920), elstara estona verkisto kaj poeto. Mi intervjuis la tradukinton, kio lin instigis por la traduko de la verko kaj kiajn malfacilaĵojn li havis en la tradukado. Laŭ li, lin instigis ĉefe la ĝenerala homa interesiĝo pri la verko, krome la antaŭaj tradukprovoj de A. Murakin, sed la rektan puŝon donis la impulso de kelkaj Budapeŝtaj amikoj. La malfacilaĵoj devenis precipe el la nekono de la hungara lingvo. Li helpis sin per la tradukoj francaj (Richard kaj Rousselot), angla (Horne) rusa (Martinov), germana (Mohácsi), finna Lyy. Tamen tiuj tradukoj montriĝis kvazaŭ fostetoj ĉirkaŭantaj la lokon de la originalo, sed ne montrantan ĝin precize. La klarigon silabo post silabo komence li faris per grandaj vortaroj, sed tiu interesa traduk-sporto estis tro malekonomia. Fine la solvon donis la helpo de Paula Palmeos, docento de la hungara lingvo en la universitato de Tartu: ŝi donis sublinian tradukon, kies arta prilaboro jam estis tasko efektivigebla.

La tragedion de l' homo, en la traduko de J. Kross, la teatro „Vainemuine" prezentis en la pasinta sezono. Tio estis ĝia unua enscenigo en Estonio. Rilate al la enscenigo mi metis demandojn al Epp KAIDU, ĉefa reĝisoro de la teatro, kiu reĝisoris la tragedion.

— Kial la teatro „Vainemuine" prenis „La tragedion de l'homo" en sian repertuaron?

— Ties intencon mi ekhavis jam antaŭlonge, sed la lastan ekpuŝon por tio donis la tutsovetia festivalo de hungaraj dramverkoj. La intenco naskiĝis el diversaj kaŭzoj. Unue, ni rigardas necesa, ke en la repertuaro de „Vainemuine", krom klasikaĵoj multe ludataj kaj vaste konataj, troviĝu ankaŭ tiaj elstaraj verkoj, kiuj diverskaŭze — eble nur pro tio, ke ili estas verkitaj en lingvo de malgrandaj nacioj — estas konataj nur al malmultaj fakuloj. Unu el tiaj verkoj estas ankaŭ „La tragedio de l'homo". Due, ni ĝenerale rigardas nia devo konatigi al la teatrovizitantoj — inter kiuj gravan lokon okupas la junularo el la Tartua Universitato — verkojn de aliaj finno-ugraj popoloj. Nia teatro estas ja la plej malnova teatro de la finno-ugraj popoloj en Sovet-unio.

— Kiel vi taksas la verkon, estante ĝia reĝisoro?

— Min ravis la larĝa filozofia kapto de „La tragedio..." Ĉiam min ravis, ĉe enscenigo de klasikaĵoj, montri, kiom aktualaj ili estas ankoraŭ nun. Kaj ĉiam min interesis trovi por la ludota verko tian scenejan solvon, kiu helpas la nuntempan spektanton, ke li superu la reziston aŭ fremdecon de la klasika formo nekutima en la nuna tempo; tian solvon, kiu helpu la spektanton percepti la poezian belecon de la formo kaj kompreni la eternajn enhavajn valorojn de la verko.

— Kiel akceptis la publiko „La tragedion..."?

— La premiero estis printempe, kiam la kulmino de la teatra sezono jam pasis. Tamen, la vizitado estis bona, kaj ni estas certaj, ke „La tragedio..." restos en nia repertuaro dum pluraj jaroj.

— Ĉu en via enscenigo troviĝas iaj principaj diferencoj kompare al aliaj enscenigoj al vi konataj?

— Mi opinias, ke ne. Almenaŭ, se mi komparas la enscenigojn viditajn en Hungario. La ĉefa diferenco estas tio, ke min ne premis la ŝarĝo de tiaj tradicioj, kiaj troviĝas ĉe la enscenigo de propraj naciaj ĉefverkoj. Ekzemple, mi estis tute libera en la elekto de la ĉefroluloj kaj povis ludigi la plej junajn aktorojn de nia teatro. Jen ankaŭ unu el la kaŭzoj, kial en nia enscenigo la maltrankvila spirito de Madách sonas junece, nuntempece kaj aktuale.

Jaan Ojalo, *Tallin, Estona SSR.*

Csaba Rékassy

Li estas ankoraŭ juna homo (nask. 1937 en Budapeŝto), tamen la samfakuloj kaj la ŝatantoj de la belarto metas lin en la unuan linion de la nuntempa hungara grafiko. Li finis la Altlernejon de la Belartoj apenaŭ antaŭ dek jaroj. Post du jaroj li jam gajnis premion, en la sekvaj jaroj liaj artaĵoj krom la hungaraj ekspozicioj rolis en Parizo, li aranĝis ekspozicion en Vieno kaj Moskvo, partoprenis en la Bienalo de Sao Paŭlo, en la Grafikaj Bienaloj de Buenos Aires, Kraków, Firenze kaj Tokio. Tute ĝis lia pasintjara, Budapeŝta memstara ekspozicio li estis rigardata kiel unu el la plej originalaj kreantoj de nia multobliga grafiko. Li elstaras ankaŭ el la hungara talenta kolegaro per sia arto inspirita de la mondo fabel-etosa, popolfabela-popolarta, karakteriza je kelkaj el tiuj artistoj. Ni kredas, ke liaj tri artaĵoj — sur la titolpaĝo kaj ĉi tie apude — konvinkos ankaŭ niajn legantojn pri tiuj ĉi virtoj de la artisto. Aparta surprizo de lia pasintjara ekspozicio estis, ke evidentiĝis, Rékassy estas ne nur talenta grafikisto, sed ankaŭ bona ceramikisto, bravura artisto de la intarzio, majstro ne nur de la papero, sed ankaŭ tiu de la argilo, ligno, emajlo kaj de la metaloj.

—gm—

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Ĉiam plezurigas min la japana revueto L'OMNIBUSO: unue, per tio, ke ĝi estas pure E-lingva, due per siaj interese japan-etosaj prozo kaj poezio. Sed mi ne konsentas kun *Miyamoto masao* en tio, ke li, ne estante franco, ne rigardas sin kompetenta recenzi la Baudelaire-tradukon de *P. Lobut* (Spleno de Parizo). Laŭ tio, recenzi tradukitan verkon devus nur samlingvano de la tradukita aŭtoro. Tamen, la tradukon oni faras ja por alilingvanoj. Krome, samlingvano pli facile preterrigardas nedigesteblajn naciismojn. Kompreneble, plej bone estus, se ĉiun recenzon farus duopo: unu samlingvano koncerne la sencan kaj efektan fidelecon kaj unu malsamlingvano raportanta pri tio, kiel lin impresis la traduko rigardata kiel memstara artoverko. Estas imageble, ke tiuj du recenzantoj konsiderinde disopinios. Ekzemple: poezia verko povas esti interpretita tre bone, sed ne tute en la originala versformo. Tiam la alilingvano plezuros pri la bela traduko, la samlingvano, male, indignos, ke la tradukinto „fuŝis" la originalon per la formoŝanĝo. Aŭ,inverse, la samlingvanon povas subaĉeti la preciza konservo de la originala formo, dum la malsamlingvano eble malkonsentos, ĉar la pedanta form-konservo kostis tro multe al la tradukinto: li devis oferi internajn valorojn, eble la tutan „guston" de la originalo. Nu, tiam necesus ankaŭ tria persono, „saĝa Salomono", kiu juĝus prave inter la du procesantoj. Sed, ho ve, kiam ni havos tiajn eblojn, kaj tian multekostan respekton de nia literaturo?

La vigla HEROLDO DE ESPERANTO videble plifortikiĝis: ĝi regalas nin ankaŭ per aldonoj. Ĝis nun aperis beletra, teknika-scienca kaj medicina-lingvistika. Inter la prilingvaĵoj *R. P. Nogueira* konigas historie la diversajn tendencojn kaj skolojn (aŭ eble modojn?) de la lingvistiko. — *Prof. Dro P. Janton,* reirante al la obstino de Ĉefeĉ, Nylén kaj aliaj, negas, ke la E-aj radikoj havas gramatikan kategoriecon. Krome, kun stranga kontraŭdiro, li avertas, ke oni entute ne parolu pri tiu oficiala, sed eksteren agaciga teorio, tamen li „malsilentas" pri ĝi en 100 linioj. Nu, unue, tio ke en la jana, nitinata, eĉ en la angla lingvo multaj vortoj povas esti dukategoriaj, estas la afero — sed ne avantaĝo — de tiuj lingvoj. Due, se el la verboj *marteli, brosi, agenti* ni ricevas per la o-finaĵo la konkretaĵ-nomojn *martelo, broso, agento,* kaj el la verboj *bati, kombi, kolporti* per la *sama* o-finaĵo la ag-nomojn *bato, kombo, kolporto,* tiam la konkreteco aŭ ageco devas enesti en la *radikoj* mem. Li asertas eĉ, ke *brosado* vortlogike egalas al *daŭra broso.* Sed *ado,* laŭ la sistemo, estas i-o, t. e. nomo de ago, *ag-o,* sekve *brosado* = *bros-i-o* = *bros-ago.* Kial oni aldonas la o- finaĵon al tiuj radikoj, kiuj jam en si mem estas substantivaj? — li demandas. Nu, unue ĉar *-o* signas ankaŭ la nominativon kaj estas liga vokalo antaŭ la plurala kaj akuzativa signoj. Due, ĉar redundanco neniam malutilas, des malpli, ke ĝi malhelpas konfuzon inter *kolon-, timon-, citron-* kaj *kolon, timon, citron.* — *R. Haupenthal* opinias, ke malnovaj vortkunmetoj, nun anstataŭataj de radikvortoj, povus aplikiĝi por elvoki efekton de arkaikeco. Certe, tre valora estas lia minado en la malnovaj tekstoj, sed mi timas, ke legante ekz-e *ŝajnkaŭzo, malenuigi, ŝnurbatilo, malatendema, malverdiro, pikradetoj, elrigardi* anst. *preteksto, distri, vipo, senpacienca, mensogo, spronoj, aspekti,* oni havus la impreson ne tiom de arkaikeco ol kiom de mallerteco. E-o estas tro juna, ol ke eblus el ĝi fiŝhoki verajn arkaismojn.

THE BRITISH ESPERANTIST ŝajnas fariĝi interesa kaj alloga literatura gazeto. Mi jam laŭdis ĝiajn recenzojn, nun mi laŭdu en ĝi anglajn tradukojn de E-a poezio fare de *Auld* kaj *Boulton,* kaj la tradukon el la „Omar Kajjam" de *Fitzgerald* fare de *Auld;* li verkis ankaŭ trinumeran eseon pri la E-aj tradukoj el *Shakespeare.* Tre bonvene amuza estas de *Marjorie Boulton* „Ekzerciĝu ride" (temas pri spritaj enigmoj), kaj mi ne forgesu pri la bonhumora unuakta farso de *Margaret Liston.*

SENNACIULO malagrable min surprizis per la anti-vakcinada (anti-imuniga) artikolo de *L. Septier:* ĉu „libera tribuno" devas publikigi ĉion stultan? Feliĉe, en la N-ro 4. venis vigla reago de pluraj. Forlasi la vakcinadon povus havi solan motivon: maldensigi la Ter-loĝantaron — sed kiu prenus sur sin la respondecon pri tia rimedo: disliberigo de epidemioj variolaj, difteriaj, ĥoleraj, flava-febraj ktp. — Goĵinde, ankaŭ *D. Dimitrijevich-Russchitty* elvokis protestojn per sia artikolo kontraŭ la tradicioj, folkloro; ŝajne la legantoj ne dezirus vivi en tiu monotonega rozkolora nebulo, kia li imagas al si la sennaciecan mondon. Pri lia daŭrigata artikolo „Nova Sociallisma Demokratio" mi skribos post ĝia finiĝo.

Mi fordiskutis mian spacon, tial mi povas nur mencii la bonegan revuon HOMO KAJ KOSMO aperanta en Zagrebo: klarstile kaj atentostreĉe li popularigas konojn astronomiajn, tiel aktualajn en niaj tagoj.



1922 1972

50

JARA

FORTE FOTOFABRIKO

KONATA
EN TUTA MONDO
PRI ĜIA FILMO
KAJ FOTOPAPERO

FORTE



ĈETU PRODUKTOJN DE FABRIKO FORTE

Ludoviko KÖKÉNY sepdek-kvin-jara

La ĝisnuna evoluo de la Esperanto-movado grandparte ŝuldiĝas al la aktiva, persista kaj ne laste sindona laboro de kelkcento da movadaj gvidantoj, kiuj dum la pasintaj ok jardekoj dediĉis nedireblan fizikan kaj intelektan energion por multigi — ofte eble nur konservi — la membraron, aranĝi kongresojn, eldoni gazetojn, librojn. Pluraj el tiuj ĉi gvidantoj fariĝis famaj, la esperantistoj aklamis kaj aklamas ilin, sed la plimulto restis pli-malpli nekonata, ili vivas inter ni, ni ĝuas la fruktojn de ilia laboro, sed ni rimarkas ilin nur okaze de jubileoj. Unu el tiuj modestuloj estas Ludoviko *Kökény*, kiu nun — preskaŭ nekredeble — fariĝis 75 jara.

Li naskiĝis la 31-an de majo 1897 en la nord-orienta regiono de la lando, en Sátoraljaújhely. Post la fino de la mezlernejo li studas historion kaj hungaran literaturon en la Filologia Fakultato de la Budapeŝta Universitato. En 1919 — dum la 133-taga Hungara Konsilia Respubliko — li estis sindikata funkciulo de la Kolegio de Filologiaj Studentoj, tial la venkinta Horthy-reĝimo forigas lin el la universitato. Jam esperantisto — li eklernis la lingvon ĝuste en 1919 — komencas instrui en Miskolc, kie li perfektiĝas en la lingvo helpe de Ludoviko König (Király). En 1924 denove li estas en la ĉefurbo, kie li fariĝas parlamenta stenografo. Li verkis plurajn popularajn stenografiajn kaj ortografiajn lernolibrojn, kaj klopodis utiligi Esperanton ankaŭ en tiu fako: li adaptis la Radnai-stenografion al nia lingvo. Post la reveno al Budapest li baldaŭ ekaktivas en la movado: en 1928 li fondis la revuon *Hungara Heroldo* kaj redaktis ĝin dum kvin jaroj. Tiu ĉi revuo multe utilis al la movado, ĉar pluraj eminentuloj de la tiama hungara kultura vivo aperigis en ĝi artikolojn, kio — ĉefe en la intelektula medio — multe popularigis nian lingvon. Same tre valora kontribuo al la popularigo de Esperanto estis la tri volumoj de la nacilingva *Hungara Esperanto-Jarlibro.* Li verkis artikolojn pri Esperanto ankaŭ por kvar hungaraj enciklopedioj, inter kiuj elstaras la tre bona eseo pri la Esperanta literaturo, preparita por la *Mondliteratura Enciklopedio*, redaktita de Lajos *Dézsi.* Li aranĝis literaturajn vesperojn, verkis multegajn artikolojn, eldonis lernolibrojn, sed lia atuto estas la duvoluma *Enciklopedio de Esperanto*, aperinta en 1933—34. Tiu ĉi Enciklopedio — kiu eĉ post preskaŭ kvardek jaroj povas servi kiel modelo de precizeco por niaj filologoj kaj historiistoj — entenas ĉiun gravan indikon pri la historio kaj literaturo de Esperanto. La esperantistaro nun atendas la naskiĝon de historia kaj literatura manlibro: tiu espero sen la Enciklopedio estus tute vana. Esplorantoj de nia kulturhistorio bone scias, kion signifas havi firman grundon sub la piedoj en la kaoso de dokumentmankoj, kaj tiun firman grundon liveras ĝuste tiu Enciklopedio. Mi ne facile povus nomi libron, kiu superus en graveco la Enciklopedion, redaktitan de Kökény; en la simpla esperantisto ĝi vekas fieron: jen, via tradicio, tion vi ĝis nun atingis; por la nunaj kaj estontaj esplorantoj ĝi liveras ĉiam fidindajn, objektivajn kaj detalajn indikojn pri la unuaj 46 jaroj de Esperanto. Ni esperu, ke la nun verkata dua eldono estos inda posteulo de la majstroverko de Kökény kaj de liaj kunlaborantoj.

Dum ok jaroj — inter 1961 kaj 1968 — li estis ĉefredaktoro de Hungara Vivo, kiu dum tiu ĉi periodo konkeras por si ŝatindan lokon inter la Esperantaj gazetoj. Lia eksiĝo tamen ne signifas por li ripozon: li partoprenas en la redaktado de la revuo, samtempe estante redaktoro de la monata asocia organo, la *Hungara Esperantisto.*

En la esperantista vivo de Kökény ĉiam dominis la servaj laboroj: li *redaktis* kaj *redaktas* revuojn, jarlibrojn, enciklopedion, la komunan jubilean antologion de Baghy kaj Kalocsay ktp. Li servis per sia laboro aliajn: aŭtorojn kaj legantojn. Pro tio la propra verkado estis flankenmetita: pri lia talento atestas la malmultaj originalaj kaj tradukaj verkoj, kaj ne laste lia 500-paĝa hungarlingva historia verko pri la distrikto VIII de Budapest. Sed jes ja: pri manko de talentuloj nia movado ne rajtas plendi, tamen, la persisto kaj sindonemo, per kiu li servis kaj servas nian movadon — estas malofta.

Ludoviko Kökény estas 75-jara. Eble li mem ne volonte aŭdas la ciferon, sed gravas ne la nombro de la jaroj. La trimil hungaraj esperantistoj, kiuj ĉiumonate enmanigas Hungaran Esperantiston, certe ne sentas tion. Kaj certe ne sentas ankaŭ la redaktoro mem, kiu konstante grumblas pri malsano, maljuneco — sed la manuskripto de ĉiu numero atingas la presejon sen malfruo. Kaj nome de ĉiuj esperantistoj ni deziras al li, ke estu tiel ankoraŭ longe.

Vilmos *Benczik*

Vino de speciala aromo el montara regiono

Ni rekomendas la sovetan konjakon, kiu kontentigas ĉiun pretendon, al kompetentaj ŝatantoj de eminenta kvalito. Kiu foje ĝin ekkonas — estos kontanta konsumanto. Ĝi estas ricevebla en kvalito de 3, 5 kaj 6 stela. Ĝia kvalito konkuras kun la franca konjako, sed la prezo estas konsiderinde pli malalta. Rekomendita por donaco, por atendita gasto; por levo de festa etoso aĉetu iun el la konjakoj Armeniaj.

ARARAT	0,5 litro 40 °	Forintoj	95,—
ARARAT	0,5 litro 40 °	”	105,—

DÉLKER

La Kuba rumo estas konata ĉie en la mondo kaj ĉiu eksperto scias, ke la blankaj rumoj signifas kvaliton. La Kuba rumo estas ŝatata pro la eminenta aromo, glita gluteblo ankaŭ kiel brando.

Vendanto: Entrepreno Délker

ZANZO

Inter la „panelojn" de la frazeologia „Domfabriko" ni metis siatempe ankaŭ la esprimon „diri ion zanze". Je nia granda miro kaj bedaŭro, neniu el niaj multaj kontrolantoj eksterlandaj komprenis tion, do la zanzaĵon ni forstrekis, forgesis.

Nun tamen rememorigis ĝin al mi memoraĵo de *Erzsébet Kun* en sia artikoleto verkita por enigmogazeto. La okazon de ŝia artikolo donis tio, ke en Budapeŝto ree enmodiĝis la *zanzado.*

La vorto *zanzo* estas de origino indiana. La indianoj de Ekvadoro sciis la arton, kiel ŝrumpigi la kapon de la mortigita malamiko ĝis pugnogrando tiamaniere, ke ties trajtoj restu rekoneblaj. La tiel ŝrumpigitan kapon ili nomis *zanza.*

Neniu kredu tamen, ke la enmodiĝo de la zanzado signifas, ke la Budapeŝtaj poetoj aŭ dramverkistoj tiel ŝrumpigas la kapon de abomenataj kritikistoj. La hungara literatura vivo havis ja siajn disputojn, sed tiuj apenaŭ atingis la impeton de la bataloj io/ujo aŭ ata/ita, kaj ni scias, ke ankaŭ en ĉi lastaj ne temis pri ŝrumpigo de kapo de la malamiko, maksimume pri ties pia deziro.

Ĉe la zanzado temas pri la ŝrumpigo ne de kapoj sed de verkoj. En la hungaraj humuraĵgazetoj de antaŭ cent jaroj oni trovas multajn tiajn literaturajn zanzojn: dramojn, romanojn, rakontajn poemojn kondensitajn: la teksto ofte estas ankaŭ iom nebuligita ŝerce, por ke la zanzo servu ankaŭ kiel enigmo. Bonaj verkistoj trovis plaĉa okupiĝi pri tiu ĉi ludo kaj fine naskiĝis la vera, la absoluta zanzo: tuta verko en unu frazo!

Reviviĝis la ludo ankaŭ en nia jarcento: ree literatoroj ĝin kultivis, precipe *Frigyes Karinthy,* granda ŝatanto de ĉiu simila ludo. Jen du el liaj zanzoj: ŝipkuracisto venas inter malaltajn kaj altajn homojn kaj ekabomenas la normalstaturajn (Gulliver); maljuna kapitalisto konfidas sian havaĵon al siaj du filinoj, sed neniu el ili volas pagi la rentumojn kaj kiam la tria volas helpi, jam estas malfrue (Lear). Aliaj ekzemploj: Grafo delogas sian propran edzinon, kaj je tio liaj servopersonoj geedziĝas (La edziĝo de Figaro); kavaliro kantas, papo malbenas, bastono burĝonas (Tannhäuser).

La kulmino estas la duobla zanzo: esprimi la enhavon de du verkoj kiel eble plej simile. Ekzemplo: Pri ŝajnmorto li opinias, ke ĝi estas vera morto kaj tial li mortigas sin. Kion ŝi opinias ŝajna morto, tio estas vera morto kaj tial ŝi mortigas sin. (Romeo kaj Julieta; Tosca).

Jen kelkaj zanzoj, bonvolu ilin solvi. La solvojn ni donas sube, sed ne en la vicordo de zanzotekstoj: 1. Virino per sia danco turnas la kapon de viro kaj perdigas la kapon de alia viro. 2. Junulo veturanta per birdo edziĝas sen paperoj legitimaj. 3. Maljuna scienculo ricevas junigan kuracon kaj malfeliĉigas junulinon. 4. Virino karesnomata Aprila Parfumo nevalide edziniĝas al uniformita individuo. 5. Filozofo vendas sian jakon por helpi tuberkulozulinon, sed vane. 6. Profesia pajaco helpas siajn malamikojn rabi sian filinon, poste aĉetas grandpreze katon en sako por sia propra plago.

Solvoj: Faŭsto, Lohengrin, Madame Butterfly, Salome, Rigoletto, La Bohemoj.

Ni ĝojus se ni ricevus de niaj legantoj kelkajn pli bonajn zanzojn.

kk

Hungaraj eminentuloj de la scienco

Lajos Jánossy

la vastekonata atomfizikisto

La interparolo kun Lajos JÁNOSSY estas aktuala kaj interesa ne nur pro tio, ĉar li plenumis antaŭ nelonge sian 60. jaron, sed ankaŭ tial, ĉar lia scienca agado etendiĝis fore trans la limoj de nia lando. Vizitinte lin ĉiokaze, li respondis volonte al niaj demandoj.

— *Kie vi faris viajn studojn kaj de kie vi ekiris al via scienca kariero?*

— Mi estis apenaŭ sepjara, kiam post la falo de la Hungara Konsilantara Respubliko mi elmigris al Vieno kun miaj gepatroj. Tie mi faris miajn mezlernejajn kaj komencis la universitatajn studojn. Ĉi lastajn mi finis en Berlino en 1934. Poste baldaŭ mi iris en la laboratorion de la Berlina profesoro Kolhörster kaj komencis la sciencajn esplorojn.

— *Ni scias, ke vi komence disvolvis la grandan parton de via scienca agado en Anglio. Bonvolu diri ion pri tio.*

— De 1963. ĝis 1947. mi laboris en London, respektive en Manchester kaj mi daŭrigis miajn esplorojn en la instituto de la Nobel-premiita profesoro Blackett. En la Institut for Advanced Studies in Dublin mi fariĝis profesoro (1947.) kaj samtempe estro de la laboratorio de kosma radiado. En tiu tempo mi komencis publikigi miajn sciencajn studojn. En 1950. je la voko de la hungara registaro mi revenis en Hungarion.

— *Ni opinias, ke per tio komenciĝis eĉ pli fruktodona etapo de via vivo. Kiel vi povus resumi al ni ties rezultatojn?*

— Jes, unu jaron post mia reveno oni elektis min membro de la Hungara Scienca Akademio, poste mi fariĝis vicprezidanto de la Akademio kaj oni distingis min per la Kossuth-premio. Rekone mian sciencan agadon, ankaŭ pluraj eksterlandaj sciencaj akademioj akceptis min inter siajn honorajn membrojn. Intertempe mi ne ĉesigis mian verkistan agadon. En jaro 1968. mi finis la verkadon de la monografio pri „Teorio de relativismo kaj fizika realo".

— Mi konsideras aparta ĉapitro de mia vivo tiun periodon (1956—1970), kiam kiel fondinto kaj direktoro de la Centra Fizika Esplorinstituto mi daŭrigis mian laboron. Dum tiu periodo la Instituto evoluiĝis la plej granda esplorbazo de nia lando. Ĉion ĉi mi faris paralele kun mia instrulaboro, ja de komenco de la 1950-aj jaroj mi fariĝis la gvidprofesoro ĉe la atomfizika katedro en la Budapeŝta Scienca Universitato.

— *Kiun vi konsideras plej grava el viaj multspecaj agadoj?*

— Ne estas facile respondi tiun demandon, ĉar ĉiuj miaj agadoj reciproke kompletigas unu la alian. El ĉiuj miaj laborterenoj la legantoj, aŭskultantoj povas profiti ion, tiel same, kiel mi mem, la profesoro kaj scienculo. Do, vi povas vidi, ke — krom la jam menciitaj esplora kaj verkista agadoj — mi konsideras same grava la edukon de la estonta fizikista generacio.

— Kun miaj kunlaborantoj mi penadas verki konvenajn lernolibrojn, kiuj faciligas la alproprigon de la lerneja instrumaterialo. Konsiderindan parton de mia tempo mi dediĉas al la afero de la instruado. Eble mi rajtas diri, ke — ĝuste kiel rezultato de mia instruagado — mi sukcesis elformi pli evoluintan fizikan vidmanieron, en kiu ankaŭ la regantaj filozofiaj opinioj de nia erao helpis min.

— *La ĝis nun diritaj iomete jam ŝajnigas ankaŭ la daŭrigon de viaj pluaj agadoj. Tamen, ĉu ni povus aŭdi ankaŭ ion konkretan pri viaj planoj?*

— Jes, en la proksima estonto mi intencas verki monografion pri la kvantummekaniko, pri ties atingitaj rezultoj. Dume mi ne volas forgesi, ke la socia laboro estas tiel same grava por scienculo, kiel la esploro. Ĝis nun mi ankoraŭ ne faris la „bilancon" de mia vivo. Mi opinias, ke mi devas agi ankoraŭ multe sur ĉiu tereno de miaj agadoj: instrui, krei, verki, popularigi. Kaj ĉion ĉi mi ne devas komenci nun, sed daŭrigi.

István *László*

RECENZOJ

Generalo VO NGUYEN GIAP: NEFORGESEBLAJ TAGOJ. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo. 196 pp.

Generalo Giap estas unu el la ĉefaj animantoj de la Insurekcio de la vjetnama popolo en 1945, kaj estas nepre interesege, legi lian memuaron pri la periodo 1945—46. Tiam sukcese luktis la vjetnama revolucio kontraŭ la feŭda reĝimo kaj la okupanta japana imperio, kontraŭ la franca imperiismo kaj la invadanta Ĉiang Kajšek-armeo. Inter tiaj ŝarkoj la barkon de la revolucio devis direkti *Ho Chi Minh*, kies grava helpanto estis la aŭtoro, famega venkonto de la posta batalo ĉe *Dien Bien Phu*. Tiutempe naskiĝis la nova ŝtato, Vjetnama Demokratia Respubliko, novan eraon reprezentanta en la historio de la koloniismo. Vigle, en bona stilo rakontas generalo Giap la eventojn kaj trajtojn de tiuj historiaj monatoj. En la mezo de la libro staras la granda popolano, Onklo Ho, prezidanto de la nova ŝtato, homo fidela kaj grandkaraktera, mem havinta romaneskan vivon de persistega revoluciulo. Kiu volas plie koni la heroan vjetnaman popolon, kompreni pli bone ĝian kvar-jardekan batalon kaj ĝian ne-venkeblecon, apenaŭ trovas legi pli utilan ol la scenoriĉan libron de la fama armeestro kaj politikisto Giap.

E. F.

Karel Ĉapek: Libro de apokrifoj.

Tradukis: Josef Vondrusek, Brno. 106 pp. Ĉeha E-Asocio, Praha.

La libro de la grandfama aŭtoro enhavas 29 skizojn historiajn, literaturajn, mitologiajn. Ili naskiĝis en la senindulge profundpenetra kaj amarete pardonema kapo de la humanisto-aŭtoro. Tio tamen ne signifas, ke ili ne povas esti veraj. Ni ne konas leteron, en kiu Aleksandro la Granda petus Aristotelon apogi lian diecon per filozofiaj argumentoj, sed tiu letero povis ekzisti — eble ĝi nur perdiĝis. Kaj tiel same statas la afero en la ceteraj 28 skizoj: en ĉiu nin trafas simila surprizo de „povis esti tiel", „eble tamen estis tiel". Kaj ĉiu tia surprizo nin provizas ankaŭ per interesa kaj konsiderinda moralaĵo.

La traduko estas ĉiel laŭdinda: oni sentas legi bonan lingvaĵon originalan.

gng

BONA HELPLIBRO-POR KOMENCANTOJ

En la eldono de la hungara Lernolibro-Eldonejo — laŭ ordono de ministro de klerigado — ne antaŭlonge aperis „facila legaĵo" sub titolo: *Sercoj, rakontoj*. La enhavon elektis Vilmos Benczik por helpi la lernadon de E-lingvo. Kvankam oni redaktis tiun ĉi libreton por hungaraj gelernantoj, tamen ĝi pligrandigas ankaŭ la nombron de E-eldonaĵoj, donante legaĵojn por ĉiu.

Tiu sperto estas vera, ke lerni fremdan lingvon estas pli facile kun helpo de interesaj, ne komplikaj beletristikaj verkoj skribitaj en bona stilo kaj bone tradukitaj.

Tiuj ĉi ŝercoj, fabeloj, poemoj donas agrablan amuzon, samtempe sukcestravivaĵon al la lernantoj. Inter la legaĵoj troviĝas kelkaj, kiuj estas tradukitaj unuafoje E-lingve. La libreto havas entute 104 paĝojn. La esprimojn kaj vortklarigojn (ekz. en fabelo de E. Benedek), eble estus estinta pli konvena kolekti — ja temas pri helplibro — ol la vortojn, kaj doni ilin aparte laŭ legaĵoj. Oni devus atenti la principon de progresiveco kaj la iom pli malfacile legeblajn (pro vortoj nekonataj), aŭ pli longajn legaĵojn vicigi laste.

— gng —

LA NOVA, EĈ **SUPERNOVA** RAZKLINGO,



samkvalita konkuranto de la plej bonaj eksterlandaj klingoj

ĈIAM RICEVEBLA!
MALALTA PREZO!
EMINENTA KVALITO!

RAZKLINGO EL SVEDA ŜTALO, RUSTOREZISTA KUN TEGITA TRANĈRANDO

Fabrikata de Fővárosi Finommechanikai Vállalat Ĉeĵurba Fajnmekanika Entrepreno

Pri la taskoj kaj rolo de la Esperanta literaturo

Multaj ĝis nun pridubis la ekzistorajton de nia literaturo, eĉ interne de la movado. Malgraŭ tio, ĝi vivas, kaj eĉ se ĝiaj perspektivoj momente ne montras sin rozkoloraj, dum la Internacia Lingvo havos uzantojn, ĝi ne formortos. La realo plene refutas la argumentadon de tiuj, kiuj ĝin rigardas superflua balasto, aŭ eĉ „neeblaĵo", tamen estus utile difini la pretendojn, kiujn oni al ĝi starigu. Momente tiuj pretendoj vivas nur subkonscie en nia kultura vivo: ilia konkreta konceptado eble montros la aŭtoron iomete dogmema, tamen la eventuala utilo forgesigas pri tiu risko.

La E-a literaturo dum la lastaj 85 jaroj estis — kaj eĉ nun estas — la literaturo de la movado. Tiun ĉi konstaton ne malvalidigas ankaŭ la rezervema sinteno de pluraj eminentaj verkistoj koncerne la verdajn ekscentraĵojn de la esperantistoj, nek la idea supereco de la literaturo al la movado. Opinioj de iuj niaj poetoj kaj literaturistoj pri „tuthoma" literaturo kaj similaj, estas absolute senbazaj, ĉar la konsumanto kaj la financanto de tiu ĉi literaturo estos ankoraŭ longe kaj preskaŭ ekskluzive la movado. Ĉe startigo de pretendoj koncerne la E-an literaturon oni neniel rajtas ignori tiun ĉi bazan vidpunkton; oni nepre ne legu Esperantan verkon per la samaj pretendoj, kiel nacilingvan. (Mi ne pensas nepre pri malpli altaj, sed pri *malsamaj* pretendoj.)

Ofte jam estis konstatite, ke la signifo de la E-a literaturo por nia movado estas multe pli grava, ol ekzemple tiu de la hungara literaturo por la hungara nacio kaj socio. Tiu ĉi fakto necesigas eĉ pli atentan pesadon de la vidpunktoj. Speciale propra trajto de la E-a literaturo estas ĝia evoluritmo dum sia mallonga historio: per tio la unuopaj literaturaj periodoj ege ŝrumpis, el kio siavice sekvis la anakronisma kunvivado de verkoj kun tre malsamaj stilo, celo, nivelo kaj idearo. Ĉi-sube ni provos vicigi la ĉefajn taskojn, kiujn nia literaturo devas plenumi aŭ devis plenumi iam dum sia historio.

Unua kaj ĉefa tasko de la E-a literaturo estas la fortigo de la internaciismo, interkompreno, kontraŭbatalo de naciismaj fenomenoj kaj batalo por la paco. Nuntempe, kiam la supraj celoj estas propraj al hommilionoj, al dignaj internaciaj organizajoj kaj en monda skalo — almenaŭ vorte — neniu neas ilian pravecon (kiel ekzemple okazis dum la naciista periodo antaŭ la unua mondmilito), sur tiu ĉi tereno ni povas starigi al nia literaturo pretendojn tre altajn. Esperanta literatura verko, kiu ne kontentige servas — aŭ rekte kontraŭbatalas — tiujn celojn, estas reakcia, kiel ankaŭ esperantlingva traduko de tiaj nacilingvaj literaturaĵoj.

Dua, same grava tasko estas doni al la nocio „internaciismo" socie pozitivan enhavon; nome ĝi devas servi la socian progreson, kiu estas la ĉefa rimedo de la fizikaj kaj psikologiaj vivcirkonstancoj de la homaro. En la plenumo de tiu tasko tamen ĝi ne devas ignori la principojn de la dialektike interpretita humanismo. Dum la *unuan* taskon praktike senescepte ĉiu E-a verko plenumas aŭ penas plenumi, koncerne ĉi *duan* la situacio estas malpli suna: ofte — precipe antaŭ la unua mondmilito — religiaj aŭ socie sensignifaj ekstravagancaj ideoj kaj aktivecoj — fariĝis dominantaj faktoroj de literaturaj verkoj.

Trie, ĝi devas strebi al la fortigo de la pozicioj de la internacia Esperanto-movado, kiu entreprenis ne malgrandan taskon sur la tereno de la akcelo de la interkompreniĝo. Aparte tiu ĉi kriterio validas koncerne la verkojn de primovadaj temoj. Kompreneble tiu ĉi postulo ne signifas la perfortan subpremon de primovadaj satiroj por kio ne malmultas precedencoj dum nia historio. Neniu movada aŭ literatura gvidanto havas la rajton apliki premon por silentigi satiran verkiston; bona satiro ĉiam plej fidele servas la objekton de siaj kritikoj. (La serio „Kiel malvenkigi Esperanton?", aperinta antaŭ kelkaj jaroj sur la paĝoj de Germana Esperanto-Revuo, nepre apartenas al tiu grupo de la satiroj.)

Kvare, ĝi devas inter la limoj de la prudento respekti la realajn lingvajn konojn de la esperantistaro, konstante klopodante por ties altigo. Verkoj kun kontentiga lingva nivelo — precipe longaj prozaĵoj — kiuj foroferas certajn estetikajn kriteriojn por amasa popularaco, eĉ en la nuntempa literaturo povas esti rigardataj kiel pozitiva fenomeno, ja ili kontribuas al la vastigo de la rondo de la esperantlingve legantaj homoj. Ja neniu povas nei, kiom da novaj legantoj por nia literaturo akiris tinte simplaj poemetoj kaj naivaj, sed ekscitaj prozaĵoj de Baghy. Kaj male: multaj nuntempaj originalaj poemaroj, kiuj — kvankam estetike tre valoraj — malatentas la realan ligvokonon de la esperantistoj, sisteme forblovas la legemon de meze edukitaj homoj. Kompreneble mi ne proponas silentigi poetojn, simple nur petas pli da atento al niaj meze kleraj legantoj. Ĉi-terene atendas multo plenumenda ankaŭ niajn eldonejojn, se ne paroli pri la gazetaro, unuavice pri la gazetoj de la landaj asocioj.

Kvine, la nomitajn taskojn nia literaturo devas plenumi sur estetike alta nivelo. Kompreneble, estetikaj kriterioj estas singarde aplikeblaj, oni ne preteratentu vidpunktojn historiajn kaj legant-sociologiajn. Necesas klare distingi ankaŭ inter la malsame evoluintaj ĝenrogrupoj: ni havas konsiderindan poezion, do en tiu tereno oni povas esti severaj (bedaŭrinde la plimulto de niaj gazetoj tamen ne estas tia), dum, ĉe prozo oni devas konsiderinde malaltigi la pretendojn kaj ne nepre mezuri eperantistan noveliston per kriterioj, tiritaj el la verkaro de ekz. Hemingway. Ĉe dramo entute oni ĝoju, se io tia aperas.

Sesa, ne malpli grava tasko de nia literaturo estas la servo de la propra interna evoluo. Aparte salutindaj estas verkoj, kiuj fortigas ĝian internan kohezion utiligante ideajn kaj formajn atingojn de la esperanta literatura tradicio. Elforĝo de tia interna kohezio estas aparte grava, ja sen ĝi fariĝus pridubinda la nocio „Esperanta literaturo", kaj oni povus paroli maksimume pri vico de verkistoj kaj verkoj en la Internacia Lingvo. Feliĉe, nia literatura tradicio ofertas — eĉ se ne multajn, tamen sufiĉajn — sekvindaĵojn, necesas nur ke niaj verkistoj kaj poetoj konu la propran literaturon.

Krom la supre nomitaj taskoj nia literaturo havas ankoraŭ unu tre gravan, kiun jam per sia ekzisto ĝi plenumas: la esperantista leganto — kaj ankaŭ la neleganto — estas fiera pri ĝi, ja sendube ĝi estas ĝis nun la plej valora, kaj nepre la plej konkreta atingaĵo de la internacilingva movado. Tiu sentimenta sinteno de la esperantistaro al la literaturo estas nepre kultivebla kaj kultivinda grundo: restas la tasko al la verkistoj, kritikistoj kaj movadaj gvidantoj profitigi ĝin por la bono de la Esperanta kulturo, kaj mem de la internacilingva ideo.

Eble multaj ne konsentos pri la supre vicigitaj taskoj: kompreneble mi neniel volis doni iaspecan dekalogon por nia literaturo. Konkreta koncepto de ĝiaj taskoj tamen baldaŭ devos esti farata, ja per tio ni fiksos ankaŭ la celojn de la tuta movado, krome praktikaj bezonoj — scienca prilaboro de la Esperanta literaturhistorio por celoj de la supera instruado — ankaŭ ne malpli necesigas tion. La aŭtoro esperas, ke nia publiko — legantoj kaj verkistoj — diros sian opinion koncerne tiun ĉi modestan provon.

Vilmos *Benczik*

FACILAJ LEGAĴOJ

Karnavala tragedio. Patrino kolere kriadas en la ŝtuparejo:

— He, juna homo, vi aĉe min trompis! Vi promesis, ke vi akompanos hejmen mian filinon plej malfrue antaŭ noktomezo. Kaj kio okazas? Unue, jam estas la kvara post noktomezo, kaj due, ĉi tiu eĉ ne estas mia filino.

***

Du vilaĝaj patrinoj interparolas.

— Mi aŭdis, ke via filino komencis bredi kokinojn en la ĉedomaĵo. Nu, ĉu bone ŝi prosperas?

— Nu, laŭ tio, kiel oni ĝin prenas. Mi donis al ŝi monon, ke ŝi aĉetu kokinojn por la bredado, kaj nun mi aĉetas de ŝi la ovojn, kiujn ŝi manĝas kiel omleton.

HUMURO

En iu loĝejo de panela domo oni sonorigas. La dommastrino malfermas la pordon.

— Mi estas la piano-agordisto — diras la veninto.

— Sed ni tute ne vokis piano-agordiston.

— Mi scias, vi ne, sed via najbaro.

***

Fabrikdirektoron oni demandas, kiel fartas lia fileto. Li diras fiere.

— Ni povas konstati, ke li evoluas dinamike. Laŭ la nuna primezuro li estas 12 procentojn pli peza kaj 2 procentojn pli longa, ol li estis en la respektiva periodo de la pasinta plan-jaro.

Ĉe granda nupto-festeno sekvas la distranĉado de la nupta torto. La junedzo tenas sian teleron, sed la junedzino avertas:

— El ĉi tio vi ne povas manĝi. Vi devas malgrasiĝi.

***

Eksedziĝontaj geedzoj konsultas advokaton.

— Komuna posedaĵo estas tio — li diras —, kion la edzo akiris kaj la edzino ne elspezis.

***

Ĉe la Eiffel-turo staras turistoj el Usono. Unu el ili diras kapŝancele:

— Jam la sesan fojon mi estas ĉi tie, sed ŝajnas, ke ili ankoraŭ ne trovis petrolon.

Bona komenco

Mi estas komencanta esperantisto, sed post duonjara lingvolernado mi jam komencis viziti klubon, kie oni kunvenadas por amika konversacio.

Scivole mi eniris la klubejon. La unua kaj ununura, kiun mi ekvidis, estis virino, tre malsimpatia konatino, kun kiu ni reciproke evitas unu la alian de post ia malnova malagrabla afero. Tamen mi salutis ŝin laŭte, ĉar mi lernis multajn belajn salutojn kaj mi jam volonte estus ilin uzinta.

— Estu bonvena! — ŝi diris kaj afable daŭrigis. — Bonvolu sidiĝi, kara samideanino!

— Hura, mi komprenas Esperante, mi komprenas ĉion! — Ege mi ĝojis kaj forgesinte la malnovan antipation, sidiĝis apud ŝi sur la kanapon kaj parolis al ŝi laŭ la dua konversacia leciono:

— Mi tre ĝojas, ke mi vidas vin. Kiel vi fartas? — Intertempe mi pensis: ho, mi dezirus vidi vin neniam kaj nenie — sed mi ne povis tion esprimi; uzadi la tabelajn vortojn estis ankoraŭ malfacile al mi.

Ĝis alveno de aliaj klubanoj ni jam multe paroladis, ĉar ankaŭ ŝi estas komencanto kaj ankaŭ ŝi deziras ekzerci sin en la lingvo. Ni babiladis pri la agrabla hodiaŭa vetero- kaj pri tio, ke ni ambaŭ preferas la printempon al la vintro. Ja eĉ unu vorton ni ne menciis pri kolero aŭ malinklino, ĉar en nia vorttrezoro troviĝas vortoj nur por temoj jenaj: amikeco, konkordo, beleco, amuzo. Tio kunportis mildajn sentojn, do pri plezuraj temoj kun afablaj frazoj gaje ni pasigis la vesperon. Pri la temoj de familio, vojaĝoj, ŝatokupoj, interesaj travivaĵoj ni komprenis bone unu la alian. Mi ĝojis vere, ke ni povis rakonti gravaĵojn kaj interesaĵojn al tia ĉarma, malnova amikino. Ni faris interkonsenton, ke ni ĉiusemajne renkontiĝos kaj lernos, babilados kune. Mi esperas, ke ankaŭ ŝi fakte ĉeestos en la klubkunveno sekvontsemajna!

Ildikó *Tarján*

Ekzamena anekdoto

Profesoro instruinta en nia universitato havis strangan kutimon. Al ekzamenato ne scianta precize respondi, li diris:

— Kara kolego, vi ricevos du savdemandojn. Se vi sukcesos almenaŭ pri unu, mi vin ne reĵetos.

Tia kurioza savdemando estis foje:

— Diru, mi vin petas, kiom da pingloj havas tiu abio antaŭ la fenestro?

La ekzamenato respondis senhezite, tuj:

— 1 856 768

— Hm. Kaj de kie vi scias tion, kara kolego?

— Pardonon, sinjoro profesoro, ĉi tio estas jam la dua demando — respondis la trovema studento.

Post la ekzameno la profesoro renkontis profesorkolegon kaj rakontis al li la aferon. Ĉi tiu ride ĝuis la historion.

Vespere tintas la telefono ĉe la profesoro kaj sin anoncas la renkontita kolego.

— Pardonon, kara kolego, bonvolu, mi petas, rerakonti tiun bonegan ekzamen-historion, ĉar mi volus ĝin rakonti al mia edzino, kaj mi forgesis, kiom da pingloj tiu abio havis.

Sekvatage, la profesoro refabelis al la dekano kaj la ekzamen-historion kaj la surprizan demandon de la profesor-kolego.

— Vi estas perfekte prava, se vi trovis tion surpriza, — respondis la dekano. — Se iu estas tiel forgesema, kiel nia kolego, li devus skribi la nombron en sian notlibron.

Ernő *Farkas*
univ. lektoro, Szeged

La delfeno - mara frato de l' homo

„La delfeno estas frato de la homo en la maro" — konstatis en Sovetunio dekreto, kiu malpermesis la fiŝadon, la ekstermon de tiu ĉi fiŝospeco. En la lastaj jaroj ankaŭ en pluraj aliaj landoj de la mondo oni divenis, ke la delfeno kapablas ne nur al unikaj cirkaj spektakloj, sed povas esti ankaŭ aktiva kunhelpanto de la homo. Laŭ la opinio de scienculoj la delfeno estas post la homo (inkluzive ankaŭ la ĉimpanzon) la plej inteligenta estaĵo. Sur la insulo Mallorca nun en speciala akvario oni edukas delfenojn kun sukceso, por savi homojn jam preskaŭ dronontajn en la akvo.

BHG



Estas malfacila tasko skizi grandan fabrikon tiel, ke la leganto ricevu kompleksan bildon pri ĝi. La temo estas alirebla el la vidpunkto de okmil homoj laborantaj tie, kies 35%-oj apartenas al la konstanta stabo kaj faras fidele kaj ame sian laboron, pretendantan grandan kompetentecon. Oni povas konigi la temon per priskribo de la fabrikaĵoj kaj paroligo de la homoj, kiuj tiujn kreas, — aŭ per mallonga historia resumo. Ni elektis ĉi lastan manieron.

En la tempo, kiam komenciĝis en Hungario la industriigo, kiam validiĝis la tiam akceptita industrio-leĝo, en 1876 B. *Eggert* petis registron de firmo por funkciigo de entrepreno konstruanta telegrafojn.

Tiutempe jam daŭris la esplorado fare de Graham *Bell* rilate la telefonaparaton (1872—75). La patentigo okazis 14. 02. 1876. Kunlaboranto de G. Bell estis la hungaro Tivadar *Puskás*, kiu en 1877 konstruis la unuan telefoncentralon, vekante grandan sensacion en la mondekspozicio Pariza en 1879.

En Hungario Francisko *Puskás* estis la pioniro, kiu inter multaj malfacilaĵoj ekfunkciigis telefoncentralon en 01. 05. 1881. Nia patrio tiel iĝis en Eŭropo la sesa lando, kie telefona reto ekfunkciis komence kun entute 25 abonantoj. Malgraŭ la malrapideco kaj komplikaĵoj de la komenca evoluo, post kvin jaroj la nombro de abonantoj estis jam 779.

Ni citas el la hungara granda leksikono *Pallas* (eldono el 1897): „En nia patrio okupiĝis per fabrikado de telefonaparatoj la *Unuiĝinta Elektra Fabriko (Egyesült Villamossági Gyár)* antaŭe firmo *Eggert B. kaj Kompanio*, krome la firmo *Deckert* Homolka . . ."

En la 1886-jara unua hungara industria ekspozicio jam prezentis siajn fabrikaĵojn la firmo *„Eggert B."* akirante per ili grandan sukceson.

Inter aliaj firmoj ankaŭ tiu entrepreno formiĝis akcia societo en 1896, sed EGYESÜLT IZZÓLÁMPA ÉS VILLAMOSSÁGI RT. (Unuiĝinta Ampola Kaj Elektra A.S.) baldaŭ transprenis la telefon-fabrikantan uzinon, kiu en la sekvaj jaroj kiel parto de la A.S. daŭrigis sian laboron.

Komence de la 1910-aj jaroj oni fabrikas jam permane klučantajn centralojn por eksporto, ĉefe al Rumanio, Serbio kaj Turkio.

Inter la telefoncentraloj, konstruitaj post la unua mondmilito, en Budapeŝto jam ekzistas mankluĉaj centraloj kun 20 000 linioj. En 1928 la telekomunikada parto eliĝis el la lastnomita A.S. kaj formiĝis je „STANDARD VILLAMOSSÁGI RT." (Elektra Akcia Societo STANDARD).

Post la dua mondmilito la fabriko estis alŝtatigita, kaj dudek jarojn post la ŝtatigo la fabriko alprenis la nomon:

BELOIANNISZ HÍRADÁSTECHNIKAI GYÁR (BHG).

Telekomunikada Fabriko Beloiannis.

Rememorante, ke la firmo B. Eggert komence havis malpli ol 100 laboristojn, la evoluon ilustras jenaj etatciferoj: en j. 1936 estis 1991, en 1953 jam 5668, — kaj hodiaŭ pli ol 8000 laboruloj apartenas al la granda laborfamilio de BHG.

Post la alŝtatigo formiĝis la memstara evoluiga fabriksekcio, kiu inter la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj klopodis per freŝaj fortoj sur novaj vojoj esti ĉiam laŭtempa kun la konstante kreskanta evoluo. Ĉi tiun klopodon kronis plena sukceso.

Dum la postmilitaj tempoj la fabriko produktis radioprogram-sendilojn, mikroondajn kaj aliajn teleteknikajn aparatojn, telefoncentralojn kaj telefonojn. Por tiel multspeca produktado la ĝistiamaj kadroj de la fabriko jam ne sufiĉis kaj tial en la komenco de 60-aj jaroj okazis moderniga trakonstruado de la uzino je kosto de pluraj centmilionoj da forintoj kaj kun soveta helpo. Rezulto estis pliobliĝo de la produkta kapacito.

En tiu periodo okazis ankaŭ la specialigo de la fabrikado instigata ankaŭ de la en- kaj eksterlanda interesiĝo. Ja eĉ la debito de telefoncentraloj plenigis jam la produktokapablon de la fabriko. Sekve de la specialigo, nun jam pluraj Hungariaj granduzinoj okupiĝas per fabrikado de profesiaj telekomunikadaj instalaĵoj.

La ĉefinstituto de BHG en Budapeŝto (XI. Fehérvári út) estas la plej granda inter tiuj uzinoj. Ĝiaj filioj en provincaj urbetoj *Tatabánya* kaj *Kunhegyes* donas laboreblecon al la gejunularo de tiu ĉirkaŭaĵo. La konstante evoluanta fabriko konstruas nuntempe sole telefoncentralojn, — kaj ĝiaj laboruloj, konsciante sian respondecon, faras sian laboron, gravan ankaŭ por la popola ekonomio. La pretproduktaĵoj kaj ekipaĵoj — faritaj de ili — anoncas la bonan famon de la fabriko kaj de ĝiaj varoj en multaj partoj de la mondo. Tion karakterizas, ke krom la hejmlanda utiligo proksimume 80% de la produktaĵoj estas akceptataj en la internacia merkato. Inter la plej grandaj partneroj de BHG ni mencias Anglion, Ĉeĥoslovakion, Germanan Demokratian Respublikon, Pollandon, Sirion kaj Sovetunion.

Ĉiloke ni mencias, ke la entrepreno priservas la bezonojn de la Hungaria Poŝto kun plej granda zorgo, plenumante ties mendojn per konscienca atento. La tutmonda rekono de la Hungaria Poŝto, kiu ja estas la plej malnova partnero de la fabriko, ankaŭ kunhelpis plivastigi la renomon de BHG.

85% de la produktaĵoj (konsiderante la tempon de pretigo) estas kreaĵo ne pli ol kvinjara.

Je fino de la 1950-aj jaroj formiĝis la moderna *krosbartekniko.* 90%-e estas konstruataj nuntempe centraloj laŭ krosbar-sistemo. La adapto de la elektrona-tekniko ankaŭ plene estas rezulto de la hungara evoluigo.

Pro la dinamika kresko, la fabriko duobligis sian produktaron dum la lastaj dek jaroj. Depost 1968 la meza kresko de la produktado estas jare 16%-a. Por plua akcelado de la evoluo — en intereso de teknika kunlaboro — BHG ligis kontrakton kun sveda firmo *LM Ericsson.*

Krom la industriaj taskoj la entrepreno multe prizorgas interesojn de siaj laborantoj. En la refreŝigejoj de la entrepreno trovas ripozeblaĵon la laboruloj kaj preskaŭ ĉiuj iliaj familianoj. En *Balatonszabadi, Balatonlelle* kaj en la apudbalatona urbo *Keszthely,* en kiu lasta la plej moderna ripozdomo — nun por 150 personoj — ebligas la someran ripozadon. Ĝia pliampleksigo jam planata.

La Telekomunikada Fabriko Beloiannis estas la plej granda fabriko de telefoncentraloj en Mezeŭropo, kaj inde al sia bona paseo kaj aktiva prezenco, ĝi estos plu grava faktoro de la telefonteknika evoluo.



Recenzo

SHAKESPEARE:
LA TEMPESTO

Dramo. Trad. *K. Kalocsay.*
Stafeto, La Laguna, 1970. Beletraj kajeroj, n-ro 71. 120. p. 18x12 cm

Prospero, iama duko de Milano, vivas kun sia filino Miranda sur neloĝata insulo. Lian potencon rabis de li lia frato Antonio, konspire kun la Napola reĝo, poste metigis lin kaj Mirandan en kadukan boaton kaj translasis ilin al la kaprico de la maraj ondoj. Ilin savis, ke ili trafis sur la insulon, kaj tie Prospero, per magio lernita el liaj libroj, servigas al si la feon Arielo kun aliaj feoj kaj la duonhomon Kalibano. Post dekdu jaroj lia uzurpa frato kaj la Napola reĝo hazarde navigas preter la insulo: venis la tempo de la venĝo. Prospero estigas per Arielo ŝiprompan tempeston; la ŝiprompuloj rifuĝas sur la insulon kaj tie vagadas. La pekuloj tamen ne pliboniĝis ankoraŭ: la uzurpa frato facile persvadas la fraton de la reĝo, ke per fratmurdo li akiru por si la tronon. Dume ankaŭ Kalibano ribelas: volas murdigi Prosperon kaj akiri por si novan „reĝon" en la persono de drinkema servisto. Prospero malhelpas ambaŭ atencojn kaj teruras la atenculojn per diversaj sorĉaĵoj. Fine tamen li pardonas, dirante:

per mia racio
pli nobla kontraŭ mia furiozo
mi decidiĝis, ĉar pli bone estas
pardoni ol venĝi...

Li trovas inter la ŝiprompuloj indan fianĉon por Miranda: la Napolan reĝidon (la paro tuj enamiĝas reciproke). Fine li portas ĉiujn ŝiprompulojn sur la sorĉe rekreita ŝipo al sia reakirita dukregno, Milano, kaj tie jam, post la nupto de la juna paro, ĉiu tria penso estos al li la tombo. Li rezignas ankaŭ pri sia magia povo, liberigas Arielon kaj deklaras:

mi rompos la sorĉvergon, ĝin enfosos
je pluraj klaftoj, kaj pli profundege
ol iam ajn atingis plumba sondo,
dronigos mian libron.

En la dramo, kie metiĝas demandoj pri venĝo aŭ indulgo, potenco aŭ sciencula enfermiĝo, servado aŭ anima libereco, krome intereskapte kalejdoskopas realaĵo (precipe de la intrigema kortego), utopio (sed rakontata de konsilisto iom komika en sia honesta klopodo), timiga-ridinda subhomeco, ribelemo de sklavigito, feaj ludoj de aerspiritoj, rosofreŝa ĉarmo de ama paro. Tamen, ĉiujn ĉi superstaras Prospero kun sia saĝa memrego kaj rezignacia melankolio. Mi citu ekzemple lian parolon al sia estonta bofilo post la fea sceno, kiun li alsorĉis por la gejunuloj:

...kiel la senbaza konstruaĵo
de ĉi vizio, la nubĉapaj turoj,
pompaj palacoj kaj solenaj temploj,
la granda globo mem kaj kune ĉiuj,
kiuj ĝin loĝas, foje disfandiĝos
senspure, kiel ĉi senmateria
vantaĵo brila, kiu malaperis.
El tia ŝtof' ni estas kiel niaj
sonĝbildoj, kaj ĉi nian vivon etan
ĉirkaŭas dormo...

Oni ĝenerale identigas Prosperon kun la maljuniĝanta Shakespeare, adiaŭanta al sia arto. Tion ŝajnas konfirmi la lastaj versoj de la Epilogo dirata de Prospero:

Se volas vi pardonon por vi,
indulge volu min absolvi.

Tre probable temas pri absolvo el sub la dramverkistaj klopodoj. La tradukinto en sia ampleksa kaj informriĉa *Postparolo* serĉis ankaŭ aliajn biografiajn paralelaĵojn inter la agado de la dramo kaj la vivo de Shakespeare, kaj eĉ se li mem konfesas, ke eble li tro cedis al sia fantaziemo, tamen ni sciiĝas pri multo rakontinda, kio portas al ni pli proksima la figuron de la aŭtoro.

Koncerne la tradukon, ni konstatu, kiel bone kaj glate legebla ĝi estas, malgraŭ ke la lingvo de Shakespeare ĉi tie jam estas tiu de la grandaj tragedioj: konciza, kompakta, eble eĉ hirta. La E-a teksto estas tiel ekvilibrita, ke la plej gravaj vortoj ĉiam enhavas sian plejeblan sencan, sonan, kaj pozician energion. Jen kial eble skribis germana recenzisto, *ke en la tradukoj de Kalocsay troviĝas iom tro da hungara temperamento. Li sentis certe la vervon de la parolo, kiu lin preskaŭ kuntrenis.* Ni vidu unu ekzemplon. Iu rakontas la saviĝon de la reĝido el la mar-ondoj:

...eble
li vivas. Mi lin vidis, dum li batis
sub si la ondojn, rajdis ties dorson,
tretis la akvon, flankenpuŝis ties
atakojn, brustis la plej ŝvelajn
ŝaŭmkrestojn renkontatajn. Lia kapo
aŭdaca el la ondoj batalemaj
leviĝis venke, kaj per bravaj brakoj
batante gaje al la bord' li remis...

Aŭ mi citu la kanton de Arielo antaŭ sia liberiĝo:

Kun ia abelo suĉas mi,
se min de strigo puŝas kri'
konval-kalike ekkuŝas mi,
vesperto-dorse fuĝas mi,
per bril' somera duŝas mi.
hej, gaja la vivo kaj gaja la mond',
jen flati la floroj, jen luli la frond'.

Oni ofte laŭdis versan verkon per tio, ke ĝi refoje pruvas, ke Esperanto estas taŭga por interpreti poezion. Ĉi tiu traduko pruvas, ke ĝi estas plene matura por paroli ŝekspire.

Ada *Csiszár*

MI ESTAS PELÉ

Aŭtobiografio de Edson Arantes do Nascimento, nomata Pelé en la futbalmondo. Tradukis: Francisko Almada. Formato: 16 x 24 cm. 124 paĝoj.

Impona verko estas tiu ĉi libro. Impona unuavice pro la traktata temo, nome la vivo de Pelé, la tutmonde plej elstara futbalisto de ĉiuj tempoj, kaj la historio de la brazila piedpilkado, servanta kiel fono al tiu interesa, sincera kaj amuza vivrakonto.

Impona estas aliflanke tiu vervo, kun kiu s-ano Almada entreprenis traduki verkon de forte sportfaka teksto en Esperanton, en kiu ankoraŭ tute mankas oficiala sporta terminologio, interalie ankaŭ la fakterminaro de la sportobranĉo piedpilkado.

Nepre el tiu vidpunkto oni devas prijuĝi la valoron de la traduko kaj miaopinie la tradukinto plenumis laŭdinde sukcesan laboron.

Se oni preteratentas kelkajn neklarigitajn neologismojn, kelkajn malgravajn **gramatikajn** erarojn, aŭ la oftan propralingvan idiotismon uzi kondicionalon anstataŭ prezenco aŭ futuro, tiam la tekston oni trovas facile legebla kaj komprenebla, kio estas la plej grava.

Al ĉiu esperantisto, ŝatanta la futbalon, mi rekomendas tiun ĉi neĉiutagan libron.

Újlaki-Nagy

Testamento de forpasinta aktivulo

Rudolf Rakuŝa: Metodiko de la Esperanto-instruado

Verdire, la recenzon pri ĉi tiu libro mi povis fari nur en pluraj monatoj. Jen kial: unue, mi devis kritiki libron, kies aŭtoro, la movade fama lingvoinstruanto, jam ne estas inter ni; due, kaj pli grave, mi konsterniĝis pro la granda amplekso kaj detaleco de la verko: mi timis ne povi fari indan recenzon.

La libro donas ne sole, kiel atendeble, pritrakton de didaktikaj kaj metodikaj principoj, sed multe pli multe: ĝi donas al ni *horizonton.*

El la tri partoj, en kiujn la libro dividiĝas, precipe leginda estas la unua, kiu pritraktas ĝenerale la kondiĉojn kaj problemojn: ĉiu el ni estas ja kelkagrade, se ne instruanto, do propagandanto de la lingvo kaj povas agi en tio malbone, tiel ke li povas esti misa disvastiganto, eble malvastiganto de Esperanto kaj de nia ideo ĝenerale. Nu, la aŭtoro en tiu ĉi parto okupiĝas pri tiaj temoj, kiel „la instruanto de E-o", „la lernanto de E-o". Kaj krom la humanaj, specialaj ecoj de la E-instruanto, oni povas legi ankaŭ pri la kontraŭuloj de la Internacia Lingvo, pri la metodoj de la propagando kaj diskutado. Parolante pri la lernantoj, la aŭtoro ne forgesas okupiĝi — krom la junularo: ĉefa bazo de la estonta esperantistaro — ankaŭ pri la bone konataj stranguloj kaj naivuloj, kies partopreno en la movado, laŭ li, estas bedaŭrinda kaj malaprobinda.

Precipe alloge estas, ke Rakuŝa ne timas veki la intereson ankaŭ pri lingvoj ĝenerale kaj pri planlingvo aparte. Parolante pri E-o, eble iom „aŭdace" li tuŝas la demandon, ĉu E-o estas ŝlosila lingvo? Kaj, kiel sciencula konanto de la problemo li konstatas: „Esperanto ne estas kreita por fariĝi rigida ŝlosila lingvo" (tiel ĉi !). Laŭ lia argumentado kompreniĝas, ke la legendoj pri la mirinda facileco de la lingvo, larĝe disvastigataj de iuj eĉ nuntempe, estas falsaj, trompaj, netaŭgaj por propagando. Sed samloke la libro klare montras, *kiomoble pli facila* estas E-o ol aliaj lingvoj. Oni trovas pritraktitaj la malĝustaĵojn en la E-instruado, la respondecon de la instruisto, la staton de E-o en la lernejoj kaj la demandon de la faka literaturo. Mi kore deziras, ke ĉion ĉi legu ĉiuj, foliumu, gustumu, komparante la konstatojn al la propraj spertoj kaj praktiko, por perfektigi ĉi lastan laŭ la konsiloj de la libro.

La aliaj du partoj de la verko estas malpli interesaj por *ĉiu* esperantisto, sed des pli al instruanto de *iu ajn* lingvo. Ĉi tie, nome, oni trovas la plej modernajn akiraĵojn de la metodiko ĝenerale kaj speciale. La plej interesaj ĉapitroj estas tiuj pri la historio de la fremdlingva instruado, pri la diversaj metodoj: gramatika, analiza-aŭtomata, pririgarda, aganta, rekta, laŭ-Cseh-a, natura, moderna-elektanta kaj — speciale interesa por esperantistoj — la t. n. intensa metodo el la vidpunkto de E-o. Multaj dubas ja pri la ebloj de internacia lingvo ĝuste pro ĉi tiu plej modern-teknika metodo. Ankaŭ la dormometodon, ĝiajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn pritraktas la libro. La aŭtoro mem estas adepto de la moderna-elekta metodo.

La libro montras ankaŭ provlecionojn (horplanojn), ege interesajn por la fakulo, parolas pri ĉiu procedo de la lingvo-instruado, pri ties ĉiu grado ekde la elementa ĝis la supera kurso, kunligante ilin kun la movada aktivado.

Eble tro multe mi parolis pri la enhavo de la libro kaj apenaŭ ion pri ĝiaj kvalitoj. Tamen, kritiki estas malfacile libron, kies veraĵoj kaj eraroj jam restos, kiaj ili estas.

Konklude: mi varme rekomendas la libron al niaj vastaj rondoj. Ĉiu povas en ĝi trovi ion konsiderindan. La libro nepre estos, kion tiel arde volis ĝia aŭtoro, utila por nia afero.

Péter Rados

Leterkesto

Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Beeches Surrey, Anglujo; 102 Vegal Crescent, Halifax HX3 5NX, Anglujo; Viktoro Arolovič, Sovetunio, Moskvo, V—333, dm Uljanova 5; Viktor Milicin, ul. Kosiora, 87—48 Krivoj Rog, 65, Ukraino, Sovetunio; Julio Szabó, Sighetul Marmatiej, Rumanio; Marie Bartovská, Čehoslovakio kaj aliaj: — Ni tre dankas al vi la sincerajn vortojn, gratulojn.

Ni citas el leteroj:

„Ankaŭ mi bedaŭras, ke HV ne povas aperi pli ofte!... Ernst Mutschall, Halle, DDR" „... Via revuo estas valora: ĉu ĝi ne povus aperadi pli ofte (almenaŭ 6x jare?,... Adolf Stanura, Ostrava-Poruba, Čehoslovakio."

„Mi salutas vin sincere kaj dankas al vi multfoje pro via eminenta revuo. Ekde la jarkomenco mi abonis HV. Mi povas diri, ke mi kaj miaj amikoj jam senpacience atendas la sekvontajn eldonaĵojn. Al mi precipe plaĉas je ĝi la multflankeco. Restu tiel, kiel vi estas!... Bonvolu aperigi HV estonte pli ofte, kvaronjare estas tro malmulte! Tutkore salutante vin restas via fidela leganto Klaus Klimt, DDR—301, Magdeburg."

„... La artikoloj pri la *Ĉasista Mondekspozicio* kaj *Restaĵoj de la islama arkitekturo tre plaĉis al mi.* Mi tre admiras, ke la HV ĉiam regule aperas kaj la enhavo ĉiam estas tre valora kaj interesa... Jürgen Bernat, 806 Dresden, DDR."

„... Fakto estas, ke ĉiu numero estas tralegita preskaŭ centprocente. Mi taksas ĝin vere modela... Via ĉeha leganto: Zdanek Hrsel, Brno"

Ni diras dankon al ĉiuj, kaj kiel vi jam povis legi supre, Hungara Vivo aperos ekde 1973 dumonate. Ni esperas, ke vi kaj viaj amikoj restos legantoj de HV. Dankon ankoraŭfoje.

Korespondi deziras

20 gejunuloj esperantistaj — inĝenieroj k konstruktoroj — kor. pri div. temoj. Adreso; Baza za Tehničesko Razvitie (BTR) — Polski *Trambeš* — Bulgario.

Koljo Petkov Kânčev, str. Emeretinski 78 — *Loveč* — Bulgario, kor. pri literaturo, historio, geografio, astronomio, matematiko, kemio, filozofio, ekonomio; interŝanĝus pm., poŝtkovertojn, hotel-etikedojn, alumetetikedojn, kolorajn kalendaretojn.

Rondeto por komenc. (mezaĝaj fervojistoj, vendistino, poŝtisto) serĉas kor. amikojn el la tutmondo, pri la temoj: profesio, vivmaniero, turismo, junular-problemoj: Germana Dem. Resp. Germana Kulturligo 27 *Schwerin,* W. Pieck str. 8. Esp.-grupo.

Andreo Horváth 18-j. lernanto volus kor. kun lernantinoj. Sendu foton: str. M. Munkácsi 3/a, *Gödöllő* — Hungario.

Kiel oni parolas hungare — en Ameriko

La lingvon de la amerika hungararo observadis pasintan jaron d-ro Béla Kálmán, lingvistika profesoro de la Scienca Universitato Kossuth Lajos de Debrecen. Unu el la celoj de lia vojaĝo estis sekvadi la sorton de la hungara lingvo inter tiuj amerikaj hungaroj kiujn Attila József tiel mencias en sia famiĝinta poemo: Forŝanceliĝis al Ameriko unu kaj duonmiliono da niaj homoj.

En Usono kaj en Kanado nuntempe vivas sepcent-kvindekmil hungaroj. D-ro Béla Kálmán surbendigis en 12 amerikaj urboj de 78 personoj dekseshoran interparoladon. La prilaborado de la granda materialo ankoraŭ daŭras, sed kelkaj instruaj spertoj jam estas konkludeblaj. Ekzemple: la amerikaj hungaroj parolas ĝenerale iun hejman dialekton, eĉ en ties arkaika 50—70 jarojn antaŭa formo. Ilia hungara parolo plejparte estas vilaĝeca kaj ilia angla lingvo ne atingas la nivelon de urba ordinara lingvo. La plimulto parolas jam angle ankaŭ kun siaj infanoj kaj genepoj. La hungaran lingvon uzas ĝenerale nur geedzoj kaj malnovaj amikoj inter si.

Plej granda „hungara urbo" de Usono estas Nov-Jorko. Ĉi tie loĝas 120 mil hungaroj. En Cleveland vivas 51 mil, en Los Angeles 42 mil hungaroj. Plej fidele gardas sian gepatran lingvon la agrikulturaj laboristoj, kiuj grandparte ankaŭ hodiaŭ vivas en hungara medio kaj plurmiloj el ili eĉ dum 50—60 jaroj ne ellernis bone la anglan lingvon. Ankaŭ ties infanoj kaj genepoj parolas bone hungare, se ambaŭ gepatroj estas hungaraj.

HUMURO

Du amikinoj renkontiĝas surstrate.

— Kien vi portas tiun grandan torton? — demandas la unu.

— Al la sekretariino de mia edzo.

— Ĉu ŝi havas eble naskiĝtagon?

— Ne, sed ŝi estas tro svelta.

***

La patro volas fari finon al tio, ke liaj du filoj senĉese interbatadas, vagadas, interesiĝas pri nenio serioza. Li aĉetas por ili gramofonon kun belaj diskoj. Post unu semajno li aŭskultas kun granda kontento el la ĉambro de la filoj muzikverkon de Vivaldi. Li enpaŝas en la ĉambron, kaj jen, la knaboj batadas unu la alian.

— Kio estas ĉi tio?

— Boksmatĉo.

— Kaj la disko?

— Ni kontrolis, ke unu movimento daŭras precize tri minutojn.

***

— Ĉu vi scias, ke mia nevo laboras en via sekcio?

— Certe, jes. En la tago de la lasta granda futbalmatĉo li petis ja de mi forpermeson por iri al via enterigo.

***

Patrino diras:

— Mi ŝatas ĉi tiujn novajn dancojn. Dum la dancado la gejunulojn dividas sekura distanco, kaj post la dancado ili jam estas tiel lacaj, ke por nenio ili havas emon.

Pri la unika antaŭhomo en Hungarlando, pri „Sámuel"

Antaŭ sep jaroj la tutan mondon trairis famo de scienca sensacio: la arkeologoj trovis en Hungarlando restaĵojn de la antaŭhomo vivinta antaŭ duonmiliono da jaroj, en la plejstocena epoko, kiu antaŭis la nunan geohistorian epokon. Sed kie „ripozis" tiu antaŭhomo dum kvincentmil jaroj? En la ŝtonmineja argilo kaj kalkotufotavolo de vilaĝo Vértesszőlős. Paleontologo László Vértes gvidis la fosadon. La internacia kongreso de arkeologoj havis sian kunsidon en Vieno, en 1965, do samtempe, kiam la diligenta kaj feliĉa hungara paleontologo trovis diversajn restaĵojn de la supozita antaŭhomo. La scienculoj informitaj tuj vojaĝis per aŭtobuso el Vieno al la scenejo de la fosadoj. Ĉiuj miregis la interesajn trovaĵojn. Sed la vera sensacio sekvis nur post foriro de la eksterlandaj scienculoj. La terlaboristo Jenő Futó trovis gravan parton de la antaŭhoma kranio. La scienco registris la faman ostrestaĵon sub nomo „Homo Sapiens Hungaricus" inter la gravajn paleontologajn malkovraĵojn, sed la hungaraj malkovrantoj dorlotas tiun antaŭhomon eĉ nun sub nomo: „Sámuel" (Samuelo).

Per direktado de Hungara Scienca Akademio, Hungara Nacia Muzeo kaj de la universitataj katedroj oni konstruis subĉielan muzeon sur loko de la trovitaj antaŭhomaj restaĵoj, kaj tie jam ankaŭ la granda publiko povas konatiĝi kun la kalktufo-fajrujo de Samuelo kaj lia tribo, kun iliaj laboriloj, kun la plej praa „vivoformo" de la antaŭhistoriaj tempoj.

Estintus interese, se la vizitintaj scienculoj estus parolintaj Esperante. Ĉu tio estus scienca miraklo? Tute ne! Tibor Sekelj, la fama jugoslava esploristo kaj Esperantisto jam aranĝis kaj gvidis ekspedicion en Afriko, kaj la unika oficiala lingvo de la ekspedicio estis la lingvo internacia: Esperanto! Tiuj diverslingvanoj tute facile povis utiligi Esperanton kaj en sia ĉiutaga vivo kaj dum la sciencaj diskutoj.

Ferenc Jáki

MESAĜO DE PETŐFI



En Hungario tutlande jam oni komencis prepari gravan jubileon: la 150-an datrevenon de naskiĝo de Sándor Petőfi. La poeto de Libero kaj Amo vivis mallongan vivon (1823—1849), sed lia poezio, lia spirito iĝis senmorta. Liaj poemoj eĉ hodiaŭ efikas: plezurigas, entuziasmigas, montras vojon.

Ni citas el lia poemo „La poetoj de la XIX-a jarcento" vicojn, kies direndo estas valida ankaŭ por la poetoj de nia epoko. (Traduko de Kalocsay; aperis en „Libero kaj Amo", ankaŭ en HV en 1968.)

Sendu al ni la solvon de la citaĵo.
Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 1. Unua vico de la citaĵo 6. Kvara vico de la citaĵo 11. Servisto 12. Soldataj manĝovazoj 14. Kemia simbolo de radiumo 15. Bandaĝi 16. Homoj kun denaske blanka hararo 17. Al nedifinita loko 18. Ne kurba lini' 19. Talismano 20. Montril' de mezuriloj 21. Lukto 23. Supernatura estaĵ' 24. Du — per romiaj ciferoj 25. Persona pronomo, koncerna viron 26. Okupis la antaŭan lokon 27. Angla virnomo 29. ATG 30. Platboata 32. Klinko 34. Lastan vorton de preĝoj 36. Restaĵ' de korpo de mortinta sanktulo 38. Nur parte 40. Duklapa manĝebla molusko 41. Fino de vojo! 42. Infekta malsan' 45. Italia rivero 46. Perceptos per okuloj 48. Akva feino 49. Nomliteroj de soveta poeto Majakovszkij *50. Tria vico de la citaĵo* 51. Rektangul' 52. Denove 53. Nerekte paroli pri iu aŭ io 55. Sentu timon 57. Hom' disrompanta terbulojn 59. Reakiri junecon 61. Konstruaĵ' kunliganta du bordojn 63. Faru specialan ŝakpaŝon per reĝo kaj turo 64. Apartenanta al io 65. Ne vira 67. Delikata diferenco 69. UF 70. OD 71. Finaĵo de estinta tempo 72. Trikita vestaĵo konvena al la plej nova vestmaniero (adjektivo kaj substantivo) 75. Hinda filozofia sistemo, doktrino 77. Li translokigus ion (pronomo kaj verbo) 78. Ag' enlasi aeron en la pulmon 79. Valora metalo 80. Granda longpieda migranta birdo 81. Movu ĝin pli proksimen! 82. KO 83. Cilindret' da fumtabako 84. Spec' de ludo konsistanta el 28 tabuletoj.

Vertikalaj vicoj: 1. Radiko de adjektivo esprimanta ion respektegindan pro speciala religia karaktero 2. Plene pereigi 3. Plende ekkrii 4. Tabelvorto 5. Kunigi gluecajn substancojn 6. Legomaj vegetaĵoj el fam. fabacoj, kun platrondaj manĝeblaj semetoj 7. Vegetaĵo el fam. liliacoj 8. Legom', genro de papiliacoj (soya) 9. AJ 10. Tiu al kiu oni ŝuldas sumon 11. La pordo (artikolo kaj substantivo) 13. Sukera substanc' ellaborata de abeloj *15. Dua vico de la citaĵo* 16. Maldolĉa por la gusto 17. Tabelvorto 19. Arb' konifera (Abies) 20. Persona pronomo plurala 22. Denove komencis agadi 23. Manifestaci' 28. OA 29. Pesŭdo-afikso esprimanta kontraŭstaron, kontraŭecon 31. Ĉiu ekstrema flanko 33. Malbona antaŭsign' 35. Ekzisto 37. Percepti per okuloj 39. Genro de boragacoj (Echium) 43. Lok' de kie originas riveroj 44. Severege, malmilde 46. Paŝi en akvo, koto, neĝo, ktp. 47. Papera foliet' 49. Superu tiun (du vortoj) 50. Ankoraŭ ne grandaĝa 52. Miksata aro! 54. Ormoneroj validaj po 20 frankojn (Louis d'or) 56. Per la unuaj okulaj perceptoj 58. Ne fora 60. Sufikso esprimanta sekson 62. Neforigebla desegnaĵo enpikita sub la haŭton 66. Kolektiv' de ŝatataj personoj 68. NRS 71. Tabelvorto 73. Reen: Eŭropa ĉefurbo 74. Subprem', sklavig' (reen: duonronda kurba falĉilo) 76. GO 77. Asocio, societo 80. 149 per romiaj ciferoj 81. Nuanco de la voĉo 83. Kemia simbolo de kobalto 84. Konjunkcio montranta la logikan sekvon.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 72/1 estas la sekva: Szeged, Gyula, Pécs, Abaliget, Somera Esperanto Universitato Kulturfestivalo, IREN.

Libropremion gajnis: Atanas Gaev, ul. Koĉo-Kovaĉev N 23, Asenovgrad el Bulgario; Andre Bongars, 5. Allee des Peupliers, 37-Saint-Pierre-D-corps el Francio; Gizella Kőszegfalvi, Hódmezővásárhely, Makarenkó u. 1. el Hungario; kaj Tore Johansson, Silke Borgsgat 7 c, S—38 100 Kalmar el Svedio.

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: el Anglio: F-ino N. Hanson, Paul Hewitt, Alec Venture; el Ĉehoslovakio: Zuzana Bednariková, Bárta František, Paŭlo Kotmarik, kaj Adolf Ŝtanura; el GDR: Evelin Berndt, Jürgen Berndt, Klaus-Dieter Dungert, Franz Peter Kurtz, Ernst Muthshall kaj Ilse Neŭmann; el GFR: dr. T. Kondor; el Hungario: Bálint Szilárdné, Bardócz Erika, Bartók Ferenc, Bíró József, Bodnár István, Bognár Lászlóné, Csapó Anna, Dr. Csató István, Dobos Kornélia, Egry Ferenc, Eöry István, Juhász Judit, Juhász Károly, Kereszthegyi Tivadar, Kiss József, Kovács Piroska, Kun Lenke, Lőrinczi József, Magyari Károly, Nagy Imre, Papp Tibor, Pell Kálmán, Podani János, Rabi József, Székely László, Törlely Károly, Vári Márta, Wagner András, Niederfriniger Lajos, dr. Obermayer Klára, Pamlényi András, Sóti Péter; el Izraelo: Teodoro Löwenkopf:, el Jugoslavio: Veljko Knezevic, Lehotkay K. Ferenc; el Pollando: Jerzy Banacki, Maria Grochowska, Krzysztof Garncanz, Antoni Madej, E-klubo en Mystowice kaj P.E.A. Filio en Sosnowiec, Urszula Zabek; el Sovetunio: Viktoro Arolovic, Valdis Gulbis kaj B, A. Rysovec.

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62,P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A — 1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A — 1011, WIEN I.

AUSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 63366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj, Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift cond Ave. NEW YORK Parcel Service. 1590 Se-10028.

Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21 — 105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 32-a paĝo!

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

1972. XII-a jaro, 3-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*

Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*

Lingva revizio: *K. Kalocsay*

Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d--ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bláint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, D-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.

Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32.—, al eksterlando krome Ft 6,40 por afranko.

72.1393 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

THERMOFLUX

NOVA HUNGARA PRODUKTAĴO
la patento de
Industria
Instrumentfabriko



THERMOFLUX

aŭtomata
mansekiga
aparato

Eminente taŭga en manlavejoj de publikaj konstruaĵoj, hospitaloj, kuracistaj konsultejoj, ambulancoj, hoteloj, restoracioj, en lernejoj kaj edukinstitutoj, do en ĉiu loko, kie individuaj viŝtukoj ne estas aplikeblaj por higiena mansekigado.

MEDICOR MEDICOR MEDICOR MEDICOR



MEDICOR BUDAPEST

Miniatura jonizatoro
MEDICOR

Certigas la etan negativan jon-supernombron en la aerspaco de aŭtomobilo.

Ĝiaj efikoj: kreskas la sango - PH (bazeca proporcio-ŝanĝo),
malaltiĝas la sangotensio,
malpliiĝas la oksigenkonsumado de la organismo,
pliiĝas la diseriĝo de serotonino ktp.

Resume: la negativa jon-efiko montras psikologie trankviligan influon al la vegetativa nervosistemo, ekonomiiganta la vivprocezon.

Jonizatoro: kreskigas la kapablon por koncentrado,
plibonigas la ĝeneralan farton.

Medicor jonizatoro estas vendata de la etkomercaj vendejoj de Aŭto- kaj Maŝinparto-komerca Entrepreno. (Autó- és Alkatrészkereskedelmi Vállalat)

Ricevebla por 6 kaj 12 voltoj.